

1980 aprilo

73-a jaro

n-ro 892(4)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Gaja Stokholmo por la Kongreso

Vi trovos,

vikingan batakrion de Stöp en la ĉefartikolo. Bele, ke ni ankoraŭ havas kelk-iun bataleman kaj militpretan. Kompreneble, ni ne celas la absurdajn militojn kontraŭ la homa vivo. Ni pensas pri tiuj belaj helenaj konkursoj-bataloj: inter poetoj, inter saĝuloj. Paco jes ja, sed la Movado devas esti en milito komunika kun la hodiaŭa mondo. La mondo cetere jam estas en tia milito eĉ sen ni. La lingvobatalo okazas eĉ se la tuta Esperanto-movado aliĝos al la dizertuloj. Poeto (ne havas sencon diri lian nomon; li verkis en "malgranda" lingvo) veis pro la foresto de sia malamiko. Li serĉas, palpas, insidas, embuskas, ĉar surdas liaj noktoj sen la kontraŭulo. Male, niaj malamikoj novkoloniigas kaj paradas dum ni armisticas. Hm! Krome, jes, tiu stranga teksto pri Svedio (p. 67), ĝi — kredu tion — klopodas ruze trompi vin, ĉar ni komencas timi, ke al Stokholmo venos pli da homoj, ol la kongresejo povas enhavi. Jen tiom kaj tiel. Hm!

Enhavo

- 61 Faka agado: Serĉi kaj fronti la malamikon (Carl Stöp-Bowitz)
- 62 Kunsido de la Estraro de UEA: Okazos transdono de taskoj (sm)
- 63 Radioprogramoj en Esperanto: Kiel argumenti por pliaj elsendoj? (Wouter F. Pilger)
- 64 Korespondado: Sovaĝaj korespondpetoj (C. Stöp-Bowitz)
- 65 Libromerkato en 1979: Kuraĝo rikoltis apogon (kun listo de la pleje vendataj libroj dum la pasinta jaro)
- 66 Reagoj: Daŝgupto ne pravas (Detlev Blanke)
- 67 Ĉi-jara kongreslando: Al Svedio — por sperti estontecon (S. Milojević)
- 68 Harry Martinson kaj lia "Aniara": Bardo de la atomepoko (Karl Söderberg); Lumjaro estas tombo (Richard Schulz)
- 70 Kongresa komuniko — novaĵoj pri la 65a Universala Kongreso
- 71 Lingvoproblemo en scienco: Finnugristoj bezonas Esperanton (Bernard Golden)
- 73 Recenzoj: "Libro de romanoj" de V. Benczik (Aldo de' Giorgi); "Blinda ermito" de M. Caprile (Baldur Ragnarsson); "Ĉiu ĉiun" de Teo Jung (Ulrich Lins)
- 75 TEJO-paĝo: Seminario en Strasburgo: Je alies kostoj (Ian Jackson); GEJ-ludoj; Kalkulo pri IJF; Raporto pri IŜUK
- 76 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 77 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 78 Nekrologoj (H. Breitenbach, M. Jakubcová, P. Kempeneers, J. Santa-maría Neira, T. Thorsteinsson, S. Tietti, W. von Waldowski)
- 79 Ekzameno E (Bernard Golden); Anonco pri la Pasporta Servo de TEJO
- 80 Anoncetoj

La kovrilo

Somermeze en Svedio oni festas kaj dancas. Tio tie okazas iam fine de junio. Sur nia kovrila foto (disponigita de Sveda Turisma Oficejo) la scenejo estas Riddarholmen, insulo meze de Stokholmo, kiu fakte originis de tie, antaŭ sep jarcentoj. Fone, la fama Urbodomo de Stokholmo. Multloke en la mondo, la urbodomoj estas iaj ordinaraj konstruaĵoj, ejoj, kien oni iras por pagi monpunon, por akiri permeson pri rekonstruo de sia domo, por plendi, fronti la urban burokrataron. En Skandinavio, male, la urbodomoj estas lokoj de unuaranga beleco. Malfacilas diri, ĉu pli belas la Urbodomo de Oslo, tiu de Kopenhago aŭ la Urbodomo de Stokholmo. Tiun lastan oni konstruadis dum 12 jaroj. Ĝi pretis en 1923. Dum la 65a UK ĝi servas kvazaŭ kiel aldona kongresejo. En ĝia Ora Salono, kun 18 milionoj da mozaikeroj, oni bankedos. En la Blua Halo, kun la plej granda orgeno de Skandinavio (dek mil tuboj), okazos la Kongresa Balo. Estos do bele kaj gaje en Stokholmo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 91 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj eksteraj rilatoj: d-ro Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 382-5874.

Vicprezidanto: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., Britio, FK14 7HG; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Stöp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; telefono (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.


Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-822 Mi-lanówek, Pollando; tel. (22) 58 37 08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Serĉi kaj fronti la malamikon

LA ESPERANTISTOJ fieras — prave — pri tutmonda disvastiĝo de la Internacia Lingvo. La revuo *Esperanto* havas legantojn en 91 landoj, UEA havas delegitojn en pli ol 1 200 lokoj en 62 landoj. Ni povas hodiaŭ vojaĝi tra grandaj partoj de la mondo per unu sola lingvo, Esperanto. Tamen, la esperantistaro konsistigas nur tre malgrandan "popolon"; en la plej multaj el tiuj lokoj kaj landoj troviĝas nur manpleno da parolantoj de nia lingvo. Tion montras i.a. la eldonnombro de niaj periodaĵoj kaj literaturaj verkoj; ili ne vendiĝas en dekmiloj da ekzempleroj, kiel tio okazas pri periodaĵoj kaj verkoj en eĉ tute malgrandaj naciaj lingvoj. Dum jardekoj pacience kaj senlace niaj organizaĵoj, la grupoj, kluboj, societoj, landaj kaj fakaj asocioj diligente plenumas amasegon da laboro por akceptigi Esperanton. Tamen ni ne spertis la eksplodan disvastiĝon, kiun laŭ nia opinio ĝi meritas.



Go-ludo en la lucerna UK: Pasintjare fondiĝis Esperantista Go-Ligo Internacia; ĝi jam fariĝis kunlaboranta faka asocio de UEA; en 1979 aperis libro "Invito al go-ludo"

Oni jam ofte aŭdas, ke la esperantistaro tendencas kondukti sektece, enfermi sin en la rondon de "sami-deanoj", kun kiuj oni jam samopinias pri la solvo de la monda lingvoproblemo. Tio povas esti signo de natura maldiligenteco, serĉo de la "vojo de malplej forta rezisto". Sed anoj de pionira movado, kia ankoraŭ estas la Esperanto-movado, devas fari ĝuste la malon, t.e. serĉi la "malamikon", la batalon. Kaj la malamiko estas la nescio, la inerteco, la nekonscio pri la lingva diskriminacio, kiun ni ĉiuj senĉese spertadas. Ni eliru el nia "ebura turo" kaj frontu la malamikon!

Sur tiu ĉi kampo batalantoj en la unua vico devus esti la fakaj Esperanto-organizaĵoj. Ilia unua kaj ĉefa celo ĉiam laŭstatute estas disvastigi Esperanton en la faka

medio (dua celo, ekz. kiam temas pri t.n. "ŝatokupaj" aŭ "hobiaj" asocioj, estas diskonigi la "fakon" inter la esperantistoj). En kia grado nun niaj fakaj asocioj efektive laboras por tiu sia unua ĉefa celo?

Kiam mi fariĝis estrarano de UEA pri faka agado, mi unue studis la aliĝintajn kaj kunlaborantajn fakajn asociojn kaj konstatis, ke oni povas dividi ilin en 4 grupojn: 1. profesiaj (ekz. la fervojista), 2. bonfartaj (ekz. la blindula), 3. ŝatokupaj (ekz. la ŝaka), 4. filozofiaj (ekz. la religiaj). Sur la terenoj de ĉiuj tiuj kategorioj de asocioj troviĝas vastaj kampoj por informado pri Esperanto, ĉar oni ĉiam interesiĝas pri kontakto kun alilandaj samfakanoj. Ĉu tiuj kampoj efektive estas efike plugataj?

Ĉiujare post mia estraraniĝo, mi petis raportojn de ĉiuj fakaj asocioj por akiri materialon por mia kontribuaĵo al la estrara raporto. Multaj el ili lojale raportadas (sed mi devas konfesi, ke mi ankoraŭ ne sukcesis "eduki" ĉiujn fakajn asociojn eĉ al tia minimumo da kunlaboro). La raportoj ricevitaj montras kelkajn interesajn faktojn.

Pluraj fakaj asocioj plendas, kaj prave, ke oni legas tro malmulte pri ilia laboro sur la paĝoj de la revuo *Esperanto*. Sed kiu kulpas pri tio? Nur la fakaj asocioj mem kompetentas sendi al la redaktoro la aktualajn informojn pri sia laboro.

Kelkaj fakaj asocioj efektive faras kompetentajn klopodojn por informadi pri Esperanto en la fakaj medioj (ekz. la fervojista, la skolta, la katolika). Kelkaj aliaj apenaŭ ellaboris ian strategion. La grava terminologia laboro plenumata de pluraj fakaj asocioj estas valora preparado al pli vasta uzado de Esperanto sur fakaj kampoj.

Gravan paŝon en alia direkto signifas la scienca simpozio en Marília, Brazilo, en 1979, kiu per uzo de nacia lingvo apud Esperanto altiris ankaŭ fakulojn, kiuj ne jam parolas la Internacian Lingvon, sed kiuj konvinkiĝis kaj komencis lerni ĝin. Simile procedas la labor-konferencoj en Paderborn, FR Germanio.

Aparte instrua estas la detala raporto de N. Nikolov. Ĝi aperis en la marta numero (p. 45) de ĉi tiu revuo. Alian interesan aferon raportas la vegetarana asocio: ĝia sekretario estas samtempe eŭropa sekretario de Internacia Vegetara Unio, kaj klopodas maksimume utiligi tiun pozicion por la uzado de Esperanto en la faka medio.

La plimulto de la landaj asocioj havas sian informan fakon. Mi proponas, ke ankaŭ ĉiu faka asocio starigu sian informan fakon aŭ komisionon, kiu ellaboru strategion kaj pristudu la eblajn taktikojn por atingi maksimuman efikon en la faka medio. Ili diskutu siajn ideojn kaj spertojn en la kongresaj kunvenoj kaj sur

la paĝoj de *Interfake* (UEA-informilo pri faka agado) kaj de la revuo *Esperanto*.

Sed ankaŭ ĉiu unuopa fakano, kompreneble, povas fari ion. Minimume ŝi aŭ li povas ne kaŝi sian esperantistecon, sed porti la insignon (ne multajn, sed unu!) ankaŭ en sia laborejo. La kolegoj scivole demandas pri ĝi, tiel donante okazon informi pri Esperanto. Kaj ekzistas multaj aliaj manieroj informadi.

Konklude: la fakaj asocioj pere de siaj informaj komisionoj ellaboru adekvatan strategion, pristudu celkonformajn taktikojn, eventuale ŝanĝu ilin, sed ili minimume havu taktikon. Se ĝi montriĝas neefika, oni elpensu kaj elprovu alian. Inter niaj organizaĵoj la fakaj asocioj estas tiuj, kiuj havas la plej bonan okazon kontakti, informi, influi kaj konvinki neesperantistajn mediojn.

C. Stöp-Bowitz

KUNSIDO DE LA ESTRARO DE UEA:

Okazos transdono de taskoj

EN ROTERDAMO, inter la 28a kaj 30a de marto ĉijare, okazis la naŭa kunsido de la Estraro, elektita en 1977 en Rejkjaviko. Kvankam la sama Estraro kunsidos ankaŭ komence de la 65a UK en Stokholmo, iasence la ĵusa kunsido gongas la finon de ĉi tiu estrara mandato. Fakte, pro d-ro Tonkin, kiu — nun laŭ la Statuto — ne plu kandidatos kiel prezidanto, finiĝas pli longa estrara periodo, eta epoko, kiu komenciĝis en la 59a UK en 1974. Oni do devus verki kvazaŭ ian resumon, ian adiaŭon, ĉar povus okazi, ke la necesa prezento de la nova estraro, elektota en Stokholmo, ne lasos lokon okupiĝi pri tiu temo en nia septembra numero. Aliflanke, ne aperas signoj, ke en Stokholmo okazos aliaj ŝanĝoj, krom la stafeta transdono de la estraraj taskoj al aliaj homoj. Nu, eble ĝuste tiu stafeteco, tiu senpena kaj senproblema transdono de la taskoj, tio devus fine montriĝi kiel unu el la ĉefaj atingoj de la du Tonkin-aj estraroj.

Fine de marto mankis, pro profesiaj kialoj, nur la estraranoj Auld kaj Pettyn. La kunsidon ĉeestis pluraj oficistoj de la Asocio. La tagordo estis, kiel kutime, ampleksega. Ĉeftemis pri la Universalaj Kongresoj, landaj asocioj, TEJO kaj ĝiaj kongresoj, financo, administrado, fakaj asocioj, planado, eldonaĵoj kaj la Raporto pri la laborperiodo 1979/80.

La preparoj por la 65a UK en Stokholmo bone evoluas kaj la ĝisnuna aliĝoritmio montras, ke oni povas atendi kongreson de la pasintjara grandeco. La Estraro tre detale traktis la kongresan programon, kiu estas plurrilate novstila kaj escepte riĉa rilate la kon-

grestemajn kaj kulturajn aranĝojn. La kongresanoj certe bonvenigos ankaŭ la insiston de LKK, ke oni maksimume respektu la tagmezan paŭzon de du horoj, kiam preskaŭ neniu programero estas planita. La Estraro konstatis, ke la loĝsituationo en Stokholmo estas tia, ke ĝi finance superas la eblojn de multaj kongresanoj. LKK tiurilate devus fari pliajn klopodojn pri malpli kostaj loĝeblecoj.

Ankaŭ la 66a UK en Brazilio en 1981 multe okupis la Estraron, kiu konfirmis la konsiston de la tiea LKK, fiksas la aliĝkotizojn, konstatis ke baldaŭ aperos la Unua Bulteno kaj decidis, ke la kongresa ĉeftemo en Brazilio estu — "Kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj". Aparta atento estis dediĉita al la transporteblecoj por la kongresanoj, kiuj al Brazilio venos de ekster la sud-amerika kontinento. Pluraj kontaktoj tiurilate jam okazis kun diversaj flugkompanioj kaj vojaĝagentejoj. Tre verŝajne UEA organizos kelkajn vojaĝojn, kies vojoj, prezoj kaj daŭro malsamos, kvankam ili ĉiuj celos pasigon de la kongresa semajno en Brazilio. Laŭ la nunaj traktadoj ŝajnas, ke UEA povos oferti grandan elekton inter malmultekosta vojaĝo al la Kongreso mem kaj luksa vojaĝo tra pluraj sud-amerikaj landoj. Ĉio ĉi devus pli-malpli definitiviĝi antaŭ la Kongreso en Stokholmo. Tiuj kiuj jam aliĝis al la Kongreso en Brazilio do ne rapidu fiksi siajn vojaĝplanojn antaŭ ol vidi, kion UEA proponos tiurilate.

Antverpeno (Belgio) restas la plej serioza kandidato por organizi la Kongreson en 1982, kvankam tiurilate decido pro teknikaj kialoj ankoraŭ ne estas definitiva. Abundas landoj, kiuj kandidatas por organizi la kongresojn en la postaj jaroj: Hungario, Israelo, Kanado, FR Germanio, Francio, Pollando.



Brazilio, kongresurbo por 1981, komencas veni en la fokuson de la estrara (kaj movada) intereso.

Oni multe diskutis pri diversaj aspektoj de la junulara Esperanto-movado kaj TEJO, precipe pri Internaciaj Junularaj Kongresoj. Jam antaŭ la kunsido estis klare, ke TEJO ne povos kongresi venontjare en Brazilo. Post la kunsido klariĝis ke TEJO-kongreso en 1981 tamen povus okazi ekster Eŭropo. Montriĝis, ke TEJO spertas problemojn pri aliĝpetoj de regionaj organizaĵoj en landoj kie la tutŝtataj junularaj asocioj aŭ ne ekzistas aŭ ne funkcias.

UEA jam ricevis aliĝpeton de Ĉina Esperanto-Ligo, kion oni traktos en Stokholmo. Venis ankaŭ principa informpeto pri aliĝo de Kuba Esperanto-Asocio. La Estraro tre detale diskutis kotizproblemojn de individuaj membroj en Ĉeĥoslovakio. Estas decidite insisti ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio pri adekvata solvo de tiuj problemoj kaj intertempe ne ĉesigi la sendadon de la eldonaĵoj al la pasintjaraj individuaj membroj en tiu lando. La Estraro pludonas al la Komitato kontrakton pri kunlaboro kun nova faka asocio — Universala Artista Ligo de Esperantistoj.


Finance, la pasinta jaro finiĝis per pozitiva saldo de iom malpli ol du mil guldenoj. Kvankam, pro teknikaj kialoj, la Estraro ne sukcesis tralabori la spezo-konton de la Kongreso en Lucerno, jam estas tute certe, ke tiu Kongreso atingis escepte bonajn financajn rezultojn. Aliflanke, la asociaj financoj en 1980 kaj 1981 ne aŭguras kontentigajn rezultojn. Tamen, la Estraro luktas tiurilate kaj ne volas akcepti prognozojn pri negativaj saldoj. Ni vidu kiel la lukto finiĝos. Oni povus ankaŭ helpi tiurilate, ne nur per financa subteno sed ankaŭ, ekzemple, per havigo de klientoj, en- aŭ ekster-movadaj, al la Grafika Centro de UEA (Arsenaalstraat 5, B-2000 Antwerpen, Belgio).

La Estraro atente priparolis la nunan staton de la asocia administrado, i.a. pro la preskriboj de la nova Statuto, malfermiĝo de la Nov-Jorka Oficejo de UEA, planoj starigi oficejon en Budapeŝto kaj pro la baldaŭa aŭtomatigo de kelkaj administraj branĉoj. Estas faritaj pluraj tiurilataj decidoj, kiujn la Estraro intencas definitivigi en Stokholmo. Ni do revenos poste al tiuj demandoj.

Plena analiza gramatiko de Kalocsay kaj Waringhien, la plej granda eldona projekto de UEA dum kelkaj lastaj jaroj, estas jam en tia preparstato, ke oni nun serĉas la plej konvenan presiston. Estus surprizo, se la libro pretus antaŭ Stokholmo, sed ĝi do certe estos aĉetebla baldaŭ post la 65a UK. Meze de la jaro pretos la manuskripto de legolibro, kiun, laŭ mendo de UEA, verkas d-rino Marjorie Boulton. La Estraro diskutis ankaŭ la gvidprincipojn de la redakta politiko de la revuo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*. Ankaŭ al tiu temo ni revenos en iu posta numero, kiam ni klopodos doni pli da informoj pri tiu revuo, kiu ekde ĉi tiu jaro eldoniĝas en Usono.

Estis traktita ankaŭ la Raporto de la Estraro pri la laborperiodo 1979/80, kiu ĉi-jare — pro teknikaj kialoj — aperos jam en la maja revunumero. sm

RADIOPROGRAMOJ EN ESPERANTO:



Kiel argumenti por pliaj elsendoj?

ANTAŬ KELKAJ MONATOJ, Radio Pekino pli oftigis siajn elsendojn en Esperanto (vidu nian revuon de novembro 1979, p. 181). Kial? Kial fakte ili elsendis, dum la "kvarpersona bando" enlande enkarcerigis esperantistojn? Ni supozu ke la tiama elsendado, kaj ankaŭ nun la plivastigo, okazis ĉar sufiĉe da homoj aŭskultis la elsendojn kaj raportis pri tio. Io eĉ pli atentofrapa estas, ke Radio Pekino elsendas al Japanio en Esperanto. Ĝi ja havas ankaŭ japanlingvajn elsendojn. Do kial? Evidente, ĉar la Esperanto-elsendojn aŭskultas alia publiko.

Esperanto-aŭskultantoj do povas formi taŭgan publikon. Eĉ se oni jam elsendas per la koncerna nacia lingvo. Des pli devus validi, ke Esperanto-aŭskultantoj estas atingindaj, se iu stacio ne elsendas per la nacia lingvo de tiuj aŭskultantoj. La kialoj por tio estas aŭ devus esti evidentaj por ni. Sed ili estas ja interesaj kaj nekonataj por la radio-stacioj mem. Unuflanke, tiuj japanoj ne povas ricevi alian Esperanto-elsendon, do konkurenco ne ekzistas. Aliflanke (kaj tio validas ankaŭ ekster Japanio), Esperanton oni lernas preskaŭ ekskluzive por ekhavi nekomercajn internaciajn kontaktojn. Do, kiel logika konsekvenco, inter esperantistoj devas ekzisti proporcio pli da homoj kiuj volas aŭskulti eksterlandan elsendon, ol ĉe ajna alia lingvo-grupo.

Sed la stacioj ne scias pri tio, kaj ili neniam scios aŭ kredos, se ni ne montros al ili nian pretecon aŭskulti. Iu diris iam al mi: Nia stacio jes ja ricevis petojn pri enkonduko de Esperanto, sed tiuj preskaŭ ĉiam venas el nia propra lando. El eksterlando ni nur malofte aŭdas, ke iu ŝatus aŭskulti Esperanto-programon. Kaj tion mi kredas. Kiu ja skribas al stacio, kies interesiĝojn oni ne konas?

Do, kion fari? Ni mem estu konvinkitaj, ke ni estas taŭga publiko. Sed kiel la stacioj eksciu? Tio eblas nur, se ni skribas al ili. Laŭ Esperanto-parolantoj, la plej normala afero estus, se ĉiuj poreksterlandaj radio-stacioj havus programon en Esperanto. Do nia unua paŝo estu: **demandi** ĉu ili havas. Ni **ne** petu pri Esperanto-programo, ĉar io tia ne estas komplezo al ni. La stacioj ne elsendas por fari plezuron al ni, sed pro siaj propraj interesoj. Do, dua paŝo povus esti **sugesti, rekomendi** ke ili havu programojn ankaŭ en Esperanto. Por tio ekzistas pluraj bonaj kialoj, laŭ la vidpunkto de la stacioj. Jen kelkaj:

a. Se la stacio jam uzas vian nacia lingvon, diru, ke vi eble preferas programon destinitan al internacia, ne al nacia, publiko. La sukceso de la pekina Esperanto-programo por Japanio indikas, ke vi ne estas la sola kiu pensas tiel.

b. Se la stacio elsendas per nacia lingvo kiun vi komprenas, sed kiu ne estas via, eble skribu ke vi pli bone komprenas Esperanton, aŭ almenaŭ pli ŝatas aŭskulti ĝin. Kaj, supozeble, ne ĉiuj en via lando komprenas la uzatan lingvon. Cetere ankaŭ ĉi-okaze validas tio dirita sub a.

c. Se la stacio elsendas per neniuj lingvoj kiun vi komprenas, ĝi konsideru la nombron de la homoj kiuj interesiĝas ricevi informojn pri eksterlando el eksterlando inter la parolantoj de iu lingvo. Kaj se oni faras tiel, certe oni alvenos al la konkludo, ke Esperanto estas pli taŭga elekto ol la dana, sveda, hungara, estona aŭ alia "malpli granda" lingvo. Por multlingvaj regionoj, eble Esperanto estas eĉ la sola racia elekto.* Se ĉiuj inter ni kiuj posedas mallong-ondan aparaton skribus, oni eĉ ne bezonus argumenti al la stacioj. Ili jam scius.

Cetere, ni ne volas perdi la ekzistantajn Esperanto-programojn. Do ne forgesu skribi al tiuj. Se vi ne aŭ malbone ricevas ilin, skribu pri tio. Eble ili elsendos ankaŭ al via regiono.

* Pli da argumentoj vi trovos en "Konsiloj pri skribado al radiostacioj" (8 tajpitaj paĝoj). La teksto estas ricevebla kontraŭ 3 internaciaj respondkuponoj ĉe la Centra Oficejo de UEA.

La paŝoj por kontakti eksterlandajn staciojn estu do:

1. Demandi, ĉu la stacio havas elsendon en Esperanto (eventuale kun indiko, kial vi demandas tion).
2. Post ricevo de informo, ke la stacio ne havas Esperanto-programon, demandu kial ĝi ne enprogramigu elsendon en Esperanto (kun unu argumento, per viaj propraj vortoj).
3. Nur se la stacio reagis al tio, donu pli da argumentoj. Sed antaŭ tio petu ĉe UEA la koncernan konsilaron. Aŭ petu la tiulandan Esperanto-asocion pri tia skribado, jam nur pro lingvaj kialoj.

Dua cifero — 4? Ekagu nun!

Se ni ĉiuj nun tuj samtempe skribus, tio ne havus efikon, ĉar vera estas la proverbo "guto malgranda, konstante frapante...". La stacioj regule ricevu informpetojn. Do kiam vi skribu?

Simple — rigardu vian poŝtkodon, legitimilon, ŝparbank- aŭ ĝirkonton. Kiu estas la dua cifero de tiu numero? Tiu cifero indikas la monaton en kiu vi skribu. Tute simple.

Do, se tiu dua cifero estas 4, vi tuj ekagu!

Se ĝi estas 5, vi skribu en majo; se 6, en junio ktp.

Se ĝi estas 0, vi skribu en oktobro; se ĝi estas 1, en novembro aŭ en januaro. En decembro skribu tiuj, kiuj antaŭe forgesis fari tion. Kaj en 1981? Tute same. Simple, ĉu ne?

Vi havas mallong-ondan aparaton. Vi ŝatus aŭdi eksterlandajn programojn en Esperanto. Vi scias, en kiu monato vi skribu. Kion do vi skribu? Po unu poŝt-

KORESPONDADO:

Sovaĝaj korespondpetoj

KORESPONDADO estas por komencantoj la plej bona praktikado de la lingvo. Pri tio apenaŭ estas dubo. Komencanto, kiu ekhavis interesan korespondadon kaj tiel akiris alilandajn amikojn, probable restos esperantisto. Sed kiel trovi konvenajn korespondantojn?

Ĉiu esperantisto, kies adreso troviĝas en periodaĵo aŭ en alia eldonaĵo, riskas ricevi — efektive senĉese ricevas — proponojn flanke de kursgvidantoj kaj komencantoj diverslandaj. Ŝajnas, ke kursgvidantoj tute senĝene disŝprucigas siajn tiurilatajn petojn al kiuj ajn adresoj troveblaj, aŭ donas hazarde trovitajn adresojn al siaj senkulpaj kursanoj. Precipe la delegitoj de UEA estas multe ĝenataj de tiaj petoj, kvankam perado de korespondantoj ne apartenas al la taskoj de delegitoj. Same landaj Esperanto-asocioj, eldonejoj, komitataj kaj estraranoj, eĉ la prezidanto de UEA, akademi-anoj ktp. ne malofte ricevas tiajn proponojn: "Mi lernas Esperanton en kurso. Mia kursgvidanto donis

al mi vian adreson. Mi tre interesiĝas pri via belando kaj deziras interŝanĝi belajn bildkartojn kaj poŝtmarkojn. Ĉu vi volas korespondi kun mi? Mi senpacience atendas vian baldaŭan respondon"; aŭ: "Mi trovis vian adreson en la Jarlibro de UEA . . ." ktp. laŭ la supra modelo.

La fenomeno prenis tiajn dimensiojn, ke mi devis preتي multobligitan rifuzan respondleteron al tiaj petoj. Oni devas ne seniluziigi komencanton, tial li ricevu almenaŭ respondon, eĉ se rifuzan.

Ĉu ne estus eble iel instrui al niaj fervoraj kursgvidantoj, ke la gvidantoj de la Movado havas aliajn taskojn, ol korespondadi kun komencantoj, kaj ke korespondantojn oni serĉas en la rubrikoj de korespondaj anoncetoj en la Esperanto-revuoj, aŭ pere de la Koresponda Servo Mondskala (F-ino C. Hueter, 12 rue des Jacobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio), aŭ oni mem publikigas sian anonceton.

Mi konas homojn, kiuj rifuzas fariĝi ekz. fakdelegitoj, ne ĉar ili ne estas pretaj fari normalajn delegito-servojn, sed ĉar ili ne volas riski ricevadi la senĉesajn "sovaĝajn" korespondpetojn, kiuj kun absoluta certeco venus, se iliaj adresoj troviĝus en la Jarlibro.

C. Stöp-Bowitz

karto (aŭ letereto) al minimume 5 radiostacioj eksterlandaj, laŭ via propra elekto. Vi **demandu**, ĉu ili havas disaŭdigon en Esperanto. Eventuale menciuvian interesigon pri ilia lando. Ne reklamu Esperanton. Ne petu pri Esperanto-programo. Nur post ricevo de iliaj inform-materialoj, el kiuj montriĝas ke ili ne havas tian programon, sugestu enkondukon (vidu supre). Kiel adresi, se vi ne konas la adreson? Skribu al "Radio . . ., Internacia Servo" aŭ ". . .a Radio, Internaciaj Programoj" en la koncerna ĉefurbo. Nur memoru, ke Radio Nederlando troviĝas en Hilversum;

Deutschlandfunk (FRG) en Köln; Radio Kanado en Montreal kaj Radio Aŭstralio en Melbourne. Ke la BBC troviĝas en Londono, Radio Moskvo en Moskvo kaj la Voĉo de Ameriko en Washington DC, vi jam supozis. Vi skribu, krome, poŝtkarton al CO de UEA, kun mencio pri la stacioj, al kiuj vi skribis.

Ne forgesu la ekzistantajn Esperanto-programojn. Por skribi al tiuj, ne limigu vin al "via" monato!

Do, se "via" dua cifero estas 4, ekagu hodiaŭ . . . Sukceson por ni!


Wouter F. Pilger

LIBROMERKATO EN 1979:

Kuraĝo rikoltis apogon

NIA TRADICIA LISTO de la plej vendataj libroj dum la pasinta jaro ne aspektas tradicie kiam temas pri 1979. Pluraj verkoj, kiuj tra la jaroj staris ĉe la supro de la listo (*Esperanto en perspektivo*, *Plena ilustrita vortaro*, *Plena vortaro* k.a.) en 1979 disponigis la unuajn dek lokojn al tute novaj, malpli kostaj, modernaj eldonaĵoj. Jen unue — en la apuda kolumno — la listo mem pri la furoraĵoj en 1979:

Foto: Zdravko Nikolov



La memserva librovendejo en la 64a UK en Lucerno proponis al la klientoj elekton inter ĉ. 800 novaj librotitoloj.

	Gld.
1. <i>Praktika bildvortaro de Esperanto</i> (T. Watts)	13,50
2. <i>Asteriks la gaŭlo</i>	13,20
3. <i>Lingvistikaj aspektoj de Esperanto</i> (Wells)	12,00
4. <i>Baza literatura krestomatio</i> (red. Benczik)	13,80
5. <i>Veselin Damjanov kantas en Esperanto</i> , malgranda disko	9,00
6. <i>Gvidlibro por supera ekzameno</i> (red. Pechan)	15,00
7. <i>Pri lingvo kaj aliaj artoj</i> (Auld)	18,00
8. <i>Ĉiu ĉiun</i> (Jung)	36,00
9. <i>Esperantologiaj studoj</i> (Wüster)	24,00
10. <i>Ĉu li bremsis sufiĉe?</i> (Valano)	12,00
11. <i>Al vi de mi</i> (Casey) disko 18,00 / kaseto 15,00	
12. <i>Concise Esperanto and English dictionary</i> (Wells)	10,50
<i>Plena ilustrita vortaro</i> (Waringhien k.a.)	105,00
<i>Plena vortaro kun suplemento</i>	19,20
<i>Tra l' mondo</i> , disko (Tzaut)	elĉ.
<i>Veselin Damjanov kantas en Esperanto</i> , grandformata disko	18,00
13. <i>Danĝera ul'</i> , kaseto + libreto (Lepŭil')	18,00
14. <i>Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto</i> (Auld)	15,00
<i>La Sankta Biblio</i>	21,00
15. <i>Esperanto en perspektivo</i> (Lapenna, Lins, Carlevaro)	84,00
<i>La Perdita honoro de iu Katerina Blum</i> (Böll)	16,00
16. <i>Socipolitikaj aspektoj de la Esperantomovado</i> (Blanke)	13,80
17. <i>Elektitaj fabeloj</i> (Krillov)	21,00
18. <i>Esperantonimoj</i> (Gjivoje)	9,60
19. <i>Wörterbuch der internationalen Sprache</i> (Jung)	18,00
20. <i>Kruko kaj Baniko el Bervalo</i> (Beaucaire)	16,00
<i>Skota antologio</i>	15,00

La honora loko de *Praktika bildvortaro de Esperanto* estas sendisputa ankaŭ pro alia kialo: inter aprilo 1979 (kiam en nia revuo aperis la unua anonco pri la libro) kaj marto 1980, vendiĝis pli ol 3 000 ekzempleroj de tiu multrilate pionira verko. Atentigo, ke ĉi tie temas pri entrepreno de unu sola homo (Terence Watts), pri

lia propra investo, labora kaj financa, diru al la movadaj eldonistoj, kiom gravas esti kuraĝa sur ĉi tiu kampo. Multaj eldonistoj sporade sarkas sur la eldona kampo, Watts aŭdacis plugi ĝin.

Ankaŭ *Asteriks la gaŭlo*, lukse presita bildstria rakonto, estas sukcesa provo produkti modernan eldonaĵon kaj kontentigi ĉefe la junularan publikon. En la Movado, tamen, necesas ankoraŭ evoluigi la merkaton por la bildstria ĝenro.

Kvin libroj el nia 27-titola listo estas eldonaĵoj de TK/Stafeto, kies libroeldonado, bedaŭrinde, iom stagnas dum la lastaj monatoj. Hungara Esperanto-Asocio okupas la duan lokon, kun tri titoloj, kiom havas ankaŭ UEA. Gramofondiskoj kaj muzikaj kasetoj havas en ĉi tiu ekskluziva listo kvar reprezentantojn.

Dum la jaro 1979, la Libroservo de UEA vendis varojn por 183 629,53 guldenoj, kompare kun 159 026,38 gld. en 1978. Tamen, sen la vendoj dum la 64a UK en Lucerno, la kresko de la vendosumo apenaŭ ekzistus. Tiu lucerna memserva librovendejo-ekspozicio verŝajne ludis ĝenerale stimulan rolon rilate al la tuta movada libromarkato. Tre multe gravas, se la klientoj povas ankaŭ fizike vidi libron, foliumi ĝin, por aĉeti ĝin surloke aŭ poste mendi kun klara ideo pri kio temas. La sperto el Lucerno trudas postulon, ke oni rigardu la libroservon kiel gravan kaj nepran parton

de la kongresa programo. Tiurilataj preparoj por la 65a UK en Stokholmo kontentige progresas.

Fine de la pasinta jaro, la stokoj de la Libroservo de UEA valoris pli ol 150 000 guldenojn. Ĝi do restas kaj verŝajne ankoraŭ longe restos la plej granda movada vendejo ankaŭ pro la fakto, ke nur UEA povas permesi al si la investon de tiel granda sumo por librostokoj. Aliflanke, tiu investo ebligas grandan elekton, kiu siavice kondukas al grandaj vendosumoj. Krome, la prezpolitiko de UEA ludas ĉiam pli stabiligan rolon sur la movada libromarkato. Eldonejoj komencas lerni, ke la merkato postulas observon de iaj leĝoj pri la prezoj kaj rabatoj. UEA mem donas por siaj eldonaĵoj trionan rabaton kaj atendas la samon de aliaj eldonistoj. Kiam tio okazas, la vendoprezoj samas ĉe la eldonejo kaj ĉe la Libroservo de UEA. Kiam niaj prezoj estas pli altaj, tio signifas, ke la koncerna eldonejo vendis al la Libroservo de UEA siajn librojn kun minimuma aŭ neniam rabato. Tio ankaŭ signifas, ke tiuj libroj ankoraŭ longe kuŝos en la stokejo de la koncerna eldonisto.

La Libroservo de UEA eldonos ĉi-jare sian Katalogon, kies lastaj korektoj okazis meze de aprilo. Ĝi aperos samtempe kun la Jarlibro 1980 kaj kune kun ĝi distribuiĝos al ĉiuj individuaj membroj de UEA. Ni atendas, ke tiu ekspedo okazos nur en junio ĉi-jare. sm

Daŝgupto ne pravas

RIMARKOJ pri la artikolo "Kial Esperanto ne interesas lingvosciencistojn?" (*Esperanto*, febr. 1980, p. 24–25):

1. Jam la titolo estas erara. Daŝgupto neniel pruvis, ke "Esperanto ne interesas lingvosciencistojn", sed li tion simple kaj tre kuraĝe asertas.

2. Daŝgupto evidente eliras de sia scio (aŭ impresoj) pri la okcidenta lingvoscienco. Kaj tio estas tre unuflanka prezento. Almenaŭ mi mem en Germana DR tute ne spertis, ke la lingvistojn "Esperanto simple ne interesas". Mi povus longe argumenti la kontraŭon, kaj tion povas ankaŭ la profesoroj Szerdahelyi, Isajev, Bociort kaj aliaj. Kompreneble, dependas, kiel kaj sub kiuj vidpunktoj oni prezentas Esperanton al la lingvistoj

3. Estas tute malvere, ke oni povas noti "sisteman mal-kreskon de interesiĝo" pri Esperanto ekde 1887. Ĉiu, kiu iom konas la historion de la okupiĝo de lingvistoj pri la planlingva fenomeno ĝenerale kaj speciale pri Esperanto, tion scias (Schuchard, Baudouin de Courtenay, Jespersen, Meillet, Martinet kaj multaj nomoj ĝis la moderna tempo). Bedaŭrinde fakte tamen estas, ke en la unuopaj landoj nur tre maloftaj "sciantoj de Esperanto" klopodas kaj kapablas dialogi kun profesiaj lingvistoj. En la Movado ofte ne regas la klimato por allogi kaj elformi tiajn homojn.

4. Krome, ju pli la lingvoscienco komprenas sian rolon en kaj por la socio, des pli ĝi interesiĝas pri la praktikaj flankoj de la internacia komunikado. Almenaŭ en la orienteŭropaj landoj tio estas konstatebla.

5. La diversaj strukturismaj skoloj ("struktura vagonaro") ne estas tiel simple kaj unuece prijuĝeblaj, kiel tion faras Daŝgupto. La ĉefa kritiko kontraŭ strukturismo, almenaŭ en la rondoj de marksismaj lingvistoj, estas la troigo de la struktura kaj ignoro de la semantika flankoj de la lingvo. Krom tio, oni forte kritikas la nekomprenon ĉe multaj strukturistoj, ke la lingvo funkcias nur en la socio, kaj sekve ne estas priskribeb-la sen la atento al tiu socia determiniteco. Pro tio mi ege miras, ke Daŝgupto tute ne mencias la fortan (kaj daŭre plifortiĝantan) socilingvistikon.

6. Lige al tio, tute ne estas vere, ke la(?) "profesiuloj de la moderna lingvoscienco [Cetere, kio estas "moderna lingvoscienco"?] . . . pli-malpli akceptas la aktualajn aranĝojn de la mondo". Ĝuste la socilingvistiko, lingvoplanado k.s. tre evidente volas ŝanĝojn.

7. Sed, eble mi tute vane polemikas, ĉar kolego Daŝgupto nur volis diri, ke Esperanto ankoraŭ ne fariĝis kerna problemo por la lingvoscienco, ankoraŭ ne estas institucie esplorata en akademioj kaj universitatoj, en institutoj kaj alie. Kompreneble, tion ni scias. Sed la kaŭzoj estas en tio, ke la internaciaj sociaj cirkonstancoj ankoraŭ ne estas tiaj, ke la komunikada problemo trafu en la centron de la monda atento. Tio povas ŝanĝiĝi kaj ŝanĝiĝos.

Detlev Blanke



Sergels Torg en la centro de Stokholmo. La tuta ĉi-suba artikolo iasence estas nur klarigo pri ĉi tiu bildo.

Foto: Gösta Glase

Al Svedio — por sperti estontecon

SARTRE, Jean-Paul, mortis meze de aprilo. Dum duona jarcento la mondo strabe rilatis al lia penso. Kaj inverse. Mortis antaŭe, lastatempe, Fromm kaj aliaj. Kiu nun gvidos la jarcenton al la fino? Ial mi pensas pri Sartre kiam temas pri Svedio. Mi ne povas malhelpi tion. Ne temas pri lia rifuzo de la Nobel-premio. La mondo kaj la svedoj jam forgesis tion. Temas eble, eventuale, pri espero. La espero, monda kaj movada. Tiu homo, fama pro sia traktado de la malespero, sciis majeste paroli pri la espero. Ĉefroligi ĝin en la homa ("subhoma" li dirus) vivo. Ankaŭ en la Movado ĝi estas la ĉefa fonto de energio.

Sartre, Jean-Paul, pri estonteco parolis. Svedio jam estas tie. En iu postindustria socio, mi volus diri. Multaj, aŭ almenaŭ la bazaj, revoj de la aliaj homoj kaj popoloj en Svedio jam estas realaĵo. Mi parolas pri la materialaj revoj. Rigardu: Svedio troviĝas tute ĉe la pinto de la mondaj listoj pri enspezoj kaj vivnivelo. Malriĉo estas jam delonge forgesita vorto en Svedio. Ĉiu tria svedo posedas aŭtomobilon. Nur unu el kvar svedoj ne havas telefonon. Unuafoje en Svedio, antaŭ jaroj, mi ne volis sidiĝi en la dua klaso de trajno. Ĝi komfortis kiel la unua klaso en la resto de la mondo. Mi kredis eniri eraran vagonon. La sveda san-asekuro unuarangas en la mondo. Simile pri la socia asekuro, inkluzive de pensioj. La lando estas perfekte organizita. "Ĝis la harradikoj",

diras sveda konato. Vi mem vidos kaj spertos tion. Ĉio funkcias. Abundo sin proponas al ĉiu rigardo. La centro de Stokholmo pompas en organiziteco kaj puro. Sergels Torg (la placo sur la supra bildo) estas la vera koro de la urbo. Samtempe, ĝi estas sukcesa bildo de la sveda socio. Mi celas tiun Svedion, kiu en miaj pensoj tandemas kun Sartre. Svedion, kiu estas la jam realigita estonteco de ni aliaj. La svedoj vivas tiel, kiel ni ceteraj sopiras vivi. Tie la "seksa revolucio" estas jam malnova temo. Simile pri la virina egalrajteco. Eĉ infana. Ĉu vi aŭdis pri svedaj leĝoj, kiuj protektas la rajtojn de la infano? Sonu kiel ajn future, infanoj en Svedio baldaŭ rajtos je "divorco" de siaj gepatroj. Ne temas pri gejunuloj. Mi parolas pri infanoj. Maksimume pri geknaboj. Tiu Sergels Torg, kial ĝi simbolas Svedion? La placo estas plurnivela. Sube, en la grundo, rapidas trajnoj de la perfekta subtera fervojo. Ĝi mem estas kelketaĝa. Supre, sur- kaj super-tere, bruas aŭtomobiloj. La homa etaĝo de Sergels Torg estas meze inter la trajnoj kaj aŭtomobiloj. Tamen pli subtere, iel. En la mezo de la placo, el la interno de la tero, kreskas turo kelkdekmetra. Ĝi konsistas el okdek mil vitropecoj, kiuj reflektas unu la alian. Impone aŭ simile. Se la monumentoj devas movi, tiu ĉi malsukcesis en mia kazo. Eble ĉar temas pri estonteco. Kun tiuj okdek mil propraj rebriĵoj, la monumento ne bezonis min. Kaj inverse. Ho jes,

estas fontano ĉirkaŭ tiu kristaloida koloso. Kiam mi estis tie, la akvo ne funkciis. Elektronaj termometroj montris la temperaturon de "plus nul", laŭ Celsiuso. Li estis svedo, cetere.

Se pri Sergels Torg, mi devas mencii *KulturHuset* (la kultura domo). Ĝi enhavas ĉion: librojn, diskojn, sonbendojn, lumbildojn, filmojn, teatron, ekspoziciojn, lingvokursojn, debatojn, poezilegadon, ŝaktablojn, informojn, eĉ necesejon por beboj. Ĉio senpaga. Vi povas eniri tien kun adekvata lignopeco, kaj eliri kun seĝo de via propra konstruo. Iloj kaj instrukcioj estas senpagaj. Fakte, lignon eblas aĉeti ankaŭ tie. Simile pri ŝtofopeco kaj vestaĵo. Perfekte, ĉu ne?

Dum la lastaj 165 jaroj Svedio ne militis. Komforto kaj abundo en paco. Revo do. Tamen, la lando pintas en la mondo ankaŭ laŭ la nombro de la memmortigoj. En miaj noktaj promenoj tra Stokholmo, mi vidis multajn ebriulojn kaj sufiĉe da narkotitoj. Mi do konfuziĝis. Venu al Svedio por vidi vian estontecon. Por reekzameni viajn idealojn kaj revojn. **S. Milojević**

HARRY MARTINSON KAJ LIA "ANIARO":


Bardo de la atomepoko

Pasintjare Svedio kontribuis al la Esperanta literaturo per volumo eksterordinara — "Aniario". Tiu aktuala verko, en laŭdata traduko, ankaŭ laŭ sia teknika aspekto elstaras en la pli nova E-libraro.

HARRY MARTINSON, sveda verkisto kaj Nobel-premiito pri literaturo, komencis sian vivon sub tre malgajaj kaj malfacilaj kondiĉoj. Li naskiĝis en 1904 en la sudsveda provinco Blekingo. Lia patro, kiu estis unue ŝipestro kaj poste komercisto, nur malofte estis hejme kaj mortis jam en la unuaj vivojaroj de la filo. Tiam la patrino ne plu kapablis vivteni la infanojn kaj elmigris al Usono. Harry kaj liaj gefratoj estis aŭkcio venditaj al tiuj homoj, kiuj proponis la plej altan monsumon. De tempo al tempo li vivis en maljunulejo. Li ĉiam sentis, ke li ne estas dezirata kaj bonvena sed, feliĉe, li lernis ĉerpi konsolon el legado de libroj; poste la lernejo estiĝis por li hela medio meze de la mallumo.

La maltrankvila temperamento de la juna Martinson speguliĝas en liaj variaj okupoj. Li laboris sur torfkampo, striglis ĉevalojn en bieneto, senlabore ĉirkaŭvagadis kaj dum kelkaj jaroj estis maristo, sed li maldungiĝis kiam li atingis dudek tri jarojn. Tiam li jam havis malantaŭ si longajn restadojn en Brazilo kaj Hindujo.

La dekunujara edzeco kun populara sveda verkistino havis decidan signifon por lia transiro al plentempa verkado. Jam pli frue, ŝi sendis al li la libron *Sep ma-*



Harry Martinson (1904-1978), la aŭtoro de "Aniario":
Ĉu la poeta vizio trovas apogon en la realo de hodiaŭ?

roj de Kipling, kiu vekis kaj stimulis lian dormantan talenton. "Komence mi kelkfoje skribis sur malnovajn papersaketojn, dum mi plurajn monatojn devis atendadi novan maristan laboron. Nek la unua nek la alia havis grandan signifon, kiel mi skribis aŭ kie mi skribis. En luĉambro de marista hejmo mi sidis apud la radiatoro kaj detalumis kelkajn versojn, tute simple."

La titolo de la debutlibro estis *Fantomŝipoj* (1929). Ĝi enhavis poemojn kun temoj el la marista vivo, sed la kruda realo ofte koloriĝis de lia imagemo. "Marbirdoj estas niaj pensoj kaj ili ĉiam forflugas; kaj ni sidas en la ŝipkantino ĉe Cape Cod, fulgaj, ŝvitantaj — kaj la viandsupo je mia animo estas sufiĉe aĉa."

Kun kvar kolegoj Martinson publikigis antologion *Kvin junuloj*, kies komunaj trajtoj estas forta vivado, libera dinamisma lingva formo, nekatentita de rimado kaj versmezuro, kaj bluokula optimismo. Post ankoraŭ du poemaroj Martinson atingis veran famon per du libroj kun memoroj el la maristaj jaroj: *Sence-laj vojaĝoj* kaj *Kabo Ĝis Revido!*. El ili ŝprucas lia asociada kapablo, ĉu temas pri kortuŝaj sociaj priskriboj, ĉu pri bonhumoraj ekzemploj de lia ludemo, ĉio en fajreranta lingva vesto, kun surprizaj vortaj novkreo kaj kuraĝaj metaforoj. Tiuj rapidaj vojaĝskizoj estis tute novspecaj por la sveda leganto kaj ĝis nun ne havas egalajn en la sveda beleto.

En du aŭtobiografiaj libroj — *La urtikoj floras* kaj *La vojo eksteren* — Martinson rakontas pri siaj propraj infan- kaj junul-jaroj. Ilin karakterizas multe da kruelo kaj senkompato sed nur kelkiam ekbrilo de homa kompreno. Li tamen posedis bonan defendilon en sia forta fantazio kaj li eltrovas la "fuĝlianon", per kiu li sin svingas tra la arbaroj, de branĉo al branĉo.

Multaj kritikistoj komparis Harry Martinson kun la fama sveda natursciencisto Carl von Linné, kaj la simileco inter ili montriĝas precipe en vico de libroj kun neordinare akraj observoj pri la naturo.

En 1948 aperis *La vojo al Klockrike* (sveda loknomo), kiu temas pri la vagisto Bolle kaj lia migrado en la sveda kamparo, fine de la deknaŭa jarcento. Kelkaj

sed nur malmultaj el la kavaliroj de la vojoj estas krimaj, aliaj estas nelaboremaj obstinuloj, sed plej proksime al la koro de la aŭtoro staras tria kategorio, nome tiuj kiujn instigas pura amo al libereco kaj sopiro al novaj medioj.

Grandan atenton vekis *Aniario* (1956), grandioza versa epopeo en pli ol cent kantoj pri spacŝipo, "goldondo", kiu dum sia vojaĝo al la planedo Marso kun 6 000 elmigrintoj de la Tero devojiĝas kaj flugas al la konstelacio Liro, lokita tre malproksime en la senfina spaco. Efektive temas pri la nuntempa homaro, kiu vivas kvazaŭ forlasita en spaca dezerto, ĉar ĝia planedo estiĝis preskaŭ neloĝebla pro gravaj radioaktivaj difektoj. La ŝipon direktas teknike lertaj sed senpersonecaj pilotoj, kelkaj pasaĝeroj adoras ĉiajn diojn, dum aliaj amuziĝas per dancado kaj distraĵoj. Multaj kolektiĝas ĉirkaŭ la "mima", globo en kies profundo troviĝas bildoj el ĉiuj epokoj kaj regionoj en la senlima universo sed kiu samtempe estas mirakla instrumento por informado kaj orientiĝo.

Kiam la malproksima hejmplanedo, la Tero, diskreviĝas, la doloro de la "mima" fariĝas netolerebla, kaj en la dudeknaŭa kanto ankaŭ ĝi eksplodas. Sed la spacŝipo daŭre ĵetiĝas tra la jaroj kaj spaco. La kapablo

de orientiĝo perdiĝis sed la rakonto pluiras. La enfermitaj homoj ankoraŭ vivas, sopiras, esperas, iliaj memoroj kaj sonĝoj transformiĝas al bela poezio.

Unu el la multaj biografiistoj de Harry Martinson skribas jene: "*Aniario* estas verko, en kiu Martinson sukcesis esprimi sian tutan riĉegan personecon. Tie ĉi kuniĝas la sonĝo pri fuĝo kaj la hejmsopiro. Tie ĉi vivas nebridebla sciemo, fantaziaĵoj ligitaj de logiko, imponiga amatora kono pri fiziko kaj astronomio, potenca ĉiosento kiu kelkfoje povus esti nomata kosma pieco, humana patoso, eksterordinare subtila sento pri la naturo kaj ridetanta ŝercemo. Kaj sub kaj malantaŭ ĉio kreskanta angoro pro la rezultoj de la homa eksperimentemo, mordetanta nigra timo, ke ni sukcesis kapti sekretojn, kiujn ni ne kapablas regi, kiuj iutage signifos komunan pereon de la homaro. Per *Aniario* Harry Martinson, dank' al sia speciala talento — fantazio same altgrade de inĝeniero kaj de poeto —, fariĝis la bardo antaŭ ĉiuj aliaj de la atom-epoko."

Harry Martinson fariĝis membro de la Sveda Akademio en 1949, ricevis la Nobelpremion (kune kun la sveda verkisto Eyvind Johnson) en 1974, kaj mortis en februaro 1978.

Karl Söderberg

RECENZO:

Lumjaro estas tombo

Recenzas Rikardo Ŝulco (FR Germanio):

Aniario, de Harry Martinson (1904-1978). El la sveda trad. W. Auld kaj B. Nilsson. Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1979. 174p. 22cm. ISBN 91 85 288 02 0.

JEN LIBRO, kiun oni anstataŭ recenzi devus prikanti per himno, ĉar ĝi estas peco de grandioza poezio. Eble tamen ne per himno, sed prefere per elegio, ĉar ĝi estas libro plena de amara pesimismo pri la stato de la homaro kaj pri ties lasta destino.

Aniario estas eposo pri la historio de samnoma spacŝipo dum ties senalvena veturado tra la senfina kosmo kaj, sekve, pri la destino de ĝia ŝipanaro kaj pluraj miloj da pasaĝeroj. Dudekjara vojaĝo egalas al nur dekseshora distanco laŭlonge de lumjaro. "Lumjaro estas tombo." *Aniario* fine fariĝas "ostoplena muzeo", kiu tiriĝas dum dek kvin mil jaroj, kun konstanta rapideco, al la konstelacio Liro.

Nu, ni iomete pripensu! Kia diferenco fakte ekzistas inter la pasaĝeraro, kiu vojaĝas en "*Aniario*", kaj tiu, kiu estas portata tra la abisma faŭko de la malplenaĵo sur la spacŝipo Tero? Oni povus paroli pri kvanta diferenco. Sed ĉu oni povus ankaŭ paroli pri kvalita diferenco? Mi kredas, ke ne. Ni do ne trompu nin! *Aniario* estas parabolo. La goldondo "*Aniario*" funde ne estas io alia ol nia planedo. Temas do pri la destino de ni ĉiuj. Ni mem vojaĝas en "*Aniario*".

Jen proksimume la ne tro malfacile raciigebla parto de la verko, la ekstera kadro. Nun devus sekvi la klariĝa kaj priskriba prezento de la ĉiam denove ŝanĝiĝantaj internaj, multifacetaj aspektoj kaj agoj, per kiuj tiu kadro estas plenigita. Sed ĝuste ĉi tie komenciĝas la poeziaj vizioj de la verkisto, profunde veraj aludoj, terure ŝokaj aŭ kortuŝe impresaj ekkomprenoj pri psikaj cirkonstancoj, statoj, krizoj. Ili forte vibrigas la konscion kaj subkonscion, ekscitas la intuicion.

La eposo konsistas el cent tri versaroj, kies plej longa ampleksas 186 versojn kaj kies kvar plej mallongaj havas po ses versojn. La ritmo, kun raraj esceptoj, estas la kvinpieda jambo. La versoj estas blankaj aŭ rimaj. La lingvaĵo estas en ĉiuj partoj de la verko intense kunpremita, ofte fascina. Ĝi estas de altnivela poezio kaj de rara beleco, al kiu ne malmulte kontribuas agrable sonantaj propraj nomoj personaj kaj geografiaj kaj la multaj mistere teknikaj neologismoj, kies proksimumajn signifojn sufiĉe klare supozigas la kunteksto kaj kiujn la tradukintoj certe ne intencas altrudi al la Esperanta vorttrezoro.

Oni ne atendu ekscitan sciencfikcian romanon. Facila legaĵo tiu libro ne estas. Sed leginda ĝi estas. Oni legu kaj miru! Eble — kiel mi — oni ne nur miros, sed ankaŭ admiros.

*Verŝajne kion ni nomadas spaco
kaj vitroklaro ĉirkaŭ Aniario
estas spirit' eterna, nekaptebla,
kaj ni perdiĝis en spiritomaro.*

Mendu ĉe UEA: 30,60 (por Nederlando 31,82) gld., plus sendokostoj 10%.



Kongresa Komunikado

**65a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Stokholmo (Svedio)
1980 08 02 – 09**

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Adreso de LKK: Box 4009,
S-122 04 Stockholm-Enskede, Svedio

Kompletigas la Honora Komitato. Aldone al la personoj jam anoncitaj, aliĝis al la Honora Komitato de la 65a UK Lars Werner, partiestro kaj parlamentano; Jan-Erik Wikström, ministro pri edukado kaj kulturo; kaj Birgitta Wistrand, prezidanto de la virina asocio Frederika-Bremer-Förbundet. S-ino Wistrand parolos pri la sveda virina movado dum aparta programero de la UK.

Oficiala flugkompanio. Laŭ aparta kontrakto pri interŝanĝo de servoj, Skandinavia Aerlinia Sistema (Danlando, Norvegio kaj Svedio) fariĝis Oficiala Flugkompanio de la 65a UK.

ISU: rektoro, vicrektoro kaj prelegantoj. Rektoro de la 33a sesio de Internacia Somera Universitato estos la renoma lingvisto Björn Collinder. Oficos kiel vicrektoro Ebbe Vilborg, antaŭa membro de la Akademio de Esperanto.

La programo de ISU konsistos el dek du prelegoj, el same multe da landoj: Bojka Georgieva Batalska ("La proteinoj de maizo"), Werner Bormann ("Diskriminacio pro hejmlando"), Wim M.A. de Smet ("Abundoj kaj malabundoj de fokoj"), M.I. Isaev ("Pri la soveta sperto en la likvido de la socia-kultura diskriminacio"), Sin'itirô Kawamura ("Diskriminacio en nutrado, ne nur pro ekonomia kaŭzo"), Béla Mészáros ("Kelkaj demandoj de la birdorientado, birdmigrado kaj birdnavigado"), Esteban Emilio Mosonyi ("Religia diskriminacio kontraŭ indianoj"), Baldur Ragnarsson ("La proza poemo kaj ĝia apliko en la Esperanta literaturo"), Andrzej Rzymkowski ("Analizo de vilaĝaj arkitekturoj kiel pruvilo pri egaleco de etnoj"), Carl Støp-Bowitz ("Koralrifoj tropikaj kaj arktikaj"), Humphrey Tonkin ("Juĝo kaj antaŭjuĝo en *Otelo* de Shakespeare"), Ye Junjian ("La karakterizo de la moderna ĉina literaturo"). Duono de la prelegoj tuŝas la temon de la 65a UK, "Diskriminacio".

Malfermu la pordon al PET! La ĉefan kongresan teatraĵon prezentos Pola Esperanto-Teatro. Temas pri *Malfermu la pordon* de la usona verkisto K. Choliński. Oni esploras ankaŭ la eblecon prezenti iu(j)n el la dramaj verkoj premiitaj en Belartaj Konkursoj. Ludos en Stokholmo ankaŭ la Pupteatro de Rabka (Pollando), kiu prezentos la pasintjare premiitan (en Pup-

teatra Internacia Festivalo) *Muzikanto Zvirtala* de J. Wilkowski.

Ekskursprogramo: ŝipoj, kasteloj, palacoj. La ekskursoj de la 65a UK ekspluatos la geografion kaj la historion de la kongreslando. Duontagaj ekskursoj celos: la reĝan muzean batalŝipon Wasa (inaŭguritan en 1628), la artmuzeon Waldemarsudde kaj la palacon Drottningholm, kie planas ekloĝi la sveda reĝa familio. La tuttagaj ekskursoj iros jen persipe tra la stokholma arkipelago, jen aŭtobuse al kulturriĉa universitata urbo Uppsala (grava ankaŭ en la historio de la Esperanto-movado) aŭ aŭtobuse kaj ŝipe al la urbeto Mariefred kaj la kastelo Gripsholm. Cetere, kiel jam anoncite, okazos ekskursa seminario al la finnlanda insularo Åland pri "Esperanto kaj enŝtataj etnaj lingvoj". Al tiu ekskurso eblos aliĝi nur surloke.



En Stokholmo oni povas admiri ŝipojn. Tiu ĉi, iam aparteninta al la armeo, nun servas kiel junulgastejo.

Bankedo kaj balo en la Nobel-salonoj. La bankedo de la 65a UK okazos en la stokholma urbodomo, kie oni disdonas kaj prifestas la Nobel-premiojn. Oni bankedos en la plej pompa, la Ora Salono. Poste kongresanoj transiros al la Blua Salono por la balo.

Preparigas kongreseta programo. La organizantoj de la 18a Internacia Infana Kongreseto intencas partoprenigi la infanojn mem en la distra programo, kaj tiucele planas anticipe korespondi kun aliĝintoj pri iliaj specialaj talentoj. Fruaj aliĝoj estos do tre helpaj! La kotizo por la tutsemajna aranĝo, rezervita por infanoj 6- ĝis 13-jaraj, estas nur 95 guldenoj, inkluzive de loĝado, manĝoj, ekskursoj, prizorgado kaj asekuro. Aliĝilo estas havebla ĉe la kongresa administracio.

Foto: Turid Lindahl

Infana antaŭkongreseto. Kvazaŭ prepare por la stokholma kongreseto, infanoj povos aliĝi ankaŭ al la Internacia Infana Esperanto-Vilaĝo en Funka, Pollando, de la 20a ĝis la 31a de julio. Povos partopreni ankaŭ la gepatroj. Estos eble poste komune vojaĝi al Stokholmo. La kostoj por partopreno en Funka estas 150 gld. Oni pagu pere de Universala Esperanto-Asocio, kio ebligos pli grandan partoprenon ankaŭ en la 18a Internacia Infana Kongreseto. Pri aliaj detaloj ĉi-rilate skribu al: Filio de PEA, str. M. Curie-Skłodowskiej 10, PL 85-094 Bydgoszcz, Pollando.

Televido ktp. ĉe IJK. La 36a Internacia Junulara Kongreso (Rauma, Finnlando, 1980 07 25 - 08 01) estos la temo de 20-minuta televida programo, registrita dum la TEJO-Kongreso mem. Distraj programeroj inkluzivos vesperojn interkonan, finnan, teatran, literaturan kaj . . . saŭnan. Ĉi tiu IJK promesas esti plurrilate unika. Nun havebla de la kongresa adreso (36a IJK, Anundilankatu 3, SF-26100 Rauma 10, Finnlando) estas Dua Informilo, kun programskizo.

Antaŭ kaj post la UK. Krom la IJK, okazos antaŭ la UK en Stokholmo du interesaj eventoj: en Gdańsk, Pollando, kie oni esploras la utiligon de Esperanto por la diskonigo de folkloro, kaj en Mölle, Svedio, kie estos kursoj kaj ekskursoj.

Oficialaj postkongresaj aranĝoj okazos en Gotlando, Dalekarlio kaj Tännadalen en Svedio, kaj en Oslo, Norvegio. (Bonvolu noti, ke la kotizo por la gotlanda

postkongreso estas 700 gld., kiel anoncote en la Dua Bulteno. Sur la mendilo erare aperas prezo 750 gld. Tropagintoj ricevos repagon.)

Aliĝilo por ĉiuj ĉi aranĝoj estas trovebla kun la Dua Bulteno, escepte de la postkongreso en Oslo, pri kiu oni skribu al: Postkongreso en Oslo, Boks 942, Oslo 1, Norvegio.

Loĝado en Stokholmo. LKK peras hotellitojn kun tarifo de 75 ĝis 415 svedaj kronoj nokte, kontraŭ antaŭpagenda mendokotizo de 22 guldenoj. Ĉar la loĝeblecoj ene de ĉiu "kategorio" estas relative vastaj, estas rekomendinde indiki gravajn dezirojn sur la mendilo, kiel ankaŭ la principon, ĉu pli gravas la komforto aŭ la prezo. La plej malmultekosta loĝado, en bonaj dultaj ĉambroj, kostas por la tuta semajno 175 gld. por persono. La tuto estas antaŭpagenda, kaj la aranĝo daŭras de la 2a ĝis la 9a de aŭgusto.

Libroservos ESE. Kiel pasintjare en Lucerno, la libroservo en Stokholmo estos ampleksa. Prizorgos ĝin Eldona Societo Esperanto, kunlabore kun la libroservo de UEA. Eldonejoj, kiuj deziras reprezentiĝi en Stokholmo, skribu siajn proponojn al la prizorgantoj de la kongresa libroservo: ges-roj Derk C. Dam kaj Marianne Westman, Årstavägen 49.III, S-121 68 Johanneshov, Svedio. Ne estas permesite fari vendadon en la kongresejo ekster la kadro de la libroservo.

Preskaŭ 1300. Ĝis la mezo de aprilo aliĝis preskaŭ 1300 kongresanoj, plej multnombre el Svedio mem, Francio, FR Germanio kaj Nederlando.

LINGVOPROBLEMO EN SCIENCO:

Finnugristoj bezonas Esperanton

ĈI-JARE, dek unu tagojn post la fermo de la 65a Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo, komenciĝos alia grava evento en la najbara Finnlando. De la 20a ĝis la 27a de aŭgusto okazos en Turku la 5a Internacia Finnugra Kongreso. Kleruloj venontaj el la tuta mondo — lingvistoj, etnologoj, folkloristoj, arkeologoj, antropologoj kaj literaturistoj — pritraktos diversajn aspektojn de la ĉeftemo de la kongreso (Lingvistikaj kaj kulturaj strukturoj: komparo kaj disvolviĝo).

La finnugristoj okupiĝas pri sciencaj, historiaj kaj literaturaj esploroj ĉe popoloj parolantaj lingvojn, kiuj apartenas al la finnugra lingva familio. Inter tiuj lingvoj troviĝas ne-hindeŭropaj lingvoj parolataj

en Eŭropo, kiel la hungara, finna, estona kaj lapona. Apartenas tie ankaŭ la lingvoj de malpli grandaj aziaj popoloj inter Volgo kaj Uralo, en la okcidenta Siberio, kaj ankaŭ de popolsplitaĵoj en la fora nordo kaj ĉe la pacifika marbordo de Soveta Unio. Ili konsistigas diasporon de entute 25 milionoj da homoj. Iliaj lingvoj estas aglutinaj, kaj jam de jarmiloj ili apartiĝis tiel, ke tiuj ĉi popoloj, krom finnoj kaj estonoj, povas pli malfacile kompreni unu la alian ol germano kaj svedo.

Ne nur lingvistike, sed ankaŭ sur la terenoj de popolaj poezio kaj muziko, etnografio, arkeologio kaj literaturo troviĝas komunaj praelementoj. Tio estas la studmaterialo, kiu okupas la atenton de la finnugristoj. Sed kiel povas homoj, kies esplorlingvoj jam de jarmiloj diverĝis, interkompreniĝi ĉe kongreso? Certe ne per finnugraj lingvoj!

Laŭ la regularo de la 5a Kongreso, la oficialaj lingvoj estas la angla, germana kaj rusa. Tamen, sekciaj referaĵoj povas esti prezentitaj en iu konvena lingvo, sed la resumoj devas esti en unu el la oficialaj lingvoj, kiu ne estas la sama kiel tiu de la referaĵo. Laŭ la antaŭaliĝilo, en la angla lingvo, oni povas ricevi informojn pri la kongreso ne nur en la oficialaj lingvoj sed ankaŭ en la finna. Sur eldonaĵoj de la kongreso ĝia titolo estas *Congressus Internationalis Fenno-*

Ugristarum — en la latina lingvo. Tekstaj klarigoj aperas en la germana, rusa, franca (ne oficiala) kaj angla. Evidentas, ke la lingva situacio de la finnugraj kongresoj estas altgrade kaosa kaj diskriminacia. Neniu finnugra lingvo estas oficiala, eĉ kiam ĝi estas la lingvo de la kongresa lando.

Dum la 4a Kongreso (Budapeŝto, 1975), 13 ĉefreferaĵoj estis prezentitaj: 7 en la germana, 4 en la rusa kaj 2 en la franca. Partoprenantoj legis 88 aliajn referaĵojn en la sekcioj laŭ la sekva proporcio: germana 37, angla 22, rusa 18, hungara 6, franca 4 kaj finna 1. Inter tiuj hindeŭropaj lingvoj, la plej ofte uzata estis la germana, kiu estis la lingvo de 44 referaĵoj aŭ 43% de la tuto. Dum la 3a Finnugra Kongreso (Tallinn, Estonio, 1970), kvincent kleruloj el 19 landoj prelegis en la sekvaj lingvoj: franca 7, angla 44, rusa 90 kaj germana 150. Ĉu ne estas skandala paradokso, ke la finnugristoj estas devigataj interkomunikiĝi per lingvoj, kiuj ne apartenas al ilia lingvofamilio?

La konata hungara esperantisto Paŭlo Balkányi skribis pri finnugraj kongresoj en *Hungara vivo* (1973, Vol. 13, n-ro 2, p. 9). Anticipe al la 4a Kongreso en Budapeŝto, Balkányi faris la sugeston, ke oni konsilu al la kongresantoj la lernadon de Esperanto por malpliigi lingvajn malfacilaĵojn. Balkányi menciis la nomojn de kelkaj esperantistoj-lingvistoj (Géza Bárczi, Klara Majtinskaja, Paul Ariste, Vilho Setälä) kaj esperis, ke ili ĉeestos la kongreson en 1975. *Hungara vivo* (1975, Vol. 15, n-ro 6, p. 19) informis pri la kongreso, sed ne raportis pri la agado de esperantistoj-finnugristoj.

Ĉu iu finnugristo iam provis enkonduki Esperanton en finnugristajn rondojn? Por respondi tiun demandon, oni devas reiri pli ol duonjarcenton. Tiam unu el la plej eminentaj finnugristoj prezentis al siaj kolegoj la bezonon de internacia lingvo. Ne sufiĉe konata al la esperantistaro estas prelego titolita "La demando pri la universala lingvo", kiu estis prezentita en 1921 ĉe konferenco de la prestiĝa Finnugra Societo en Helsinko. La preleginto estis Emil Nestor Setälä (la patro de Vilho Setälä), kiu en la 19a jc. pionire kreis la fundamenton por finnugraj studoj. Li komencis sian prelegon listigante ĉiujn lingvojn, kies scio estas bezonata por entrepreni esplorojn sur la tereno de la finnugristiko. Temas ne nur pri lingvoj de la finnugra familio sed ankaŭ pri deko da aliaj eŭropaj lingvoj. Emil Setälä emfazis, ke tiu lingvolernado estas temporaba afero kaj, cetere, ĝi ne estas unika problemo por lingvistoj, sed troviĝas en ĉiuj sciencobranĉoj.

Post klarigo pri la neuzebleco de pazigrafioj, Setälä tuŝis la diferencon inter natura lingvo kaj artefarita lingvo, argumentante, ke ĉiuj lingvoj estas diversegrade artefaritaj, ĉar ili estas produktaĵoj de la homa kulturo. Anstataŭ la kontrasto inter lingvo natura kaj lingvo artefarita, li preferis paroli pri lingvo transdonita historie de unu generacio al alia aŭ de unu popolo al alia, kontraste kun lingvo imitanta libere la lingvojn naskiĝintajn historie.

Laŭ Setälä nek la neŭtrala latina lingvo, nek la lingvo de malgranda popolo povas plenumi la rolon de internacia lingvo, do la sola ebleco, kiu restas, estas uzi artefaritan lingvon. Li proponis Esperanton, kiun li taksis "vere inĝenia malkovro". Tiu ĉi prelego de E.N. Setälä aperis en la revuo de la Finnugra Societo, unue en la finna lingvo kaj poste en la franca.* Post pli ol 50 jaroj ĝi ne perdis sian aktualecon, kaj oni povas rekomendi la legadon ankaŭ al la nova generacio de finnugristoj.

Foliuminte la liston de partoprenintoj de la 4a Internacia Finnugra Kongreso (Budapeŝto, 1975), mi trovis jenajn nomojn de esperantistoj konataj al mi: Paul Ariste (estono), Björn Collinder (svedo), Sitosi Hukaja (japano loĝanta en Hungario) kaj Klara Majtinskaja (hungarino loĝanta en Soveta Unio). Mi ege scivolis, ĉu ili havis okazon dum la kongreso interparoli pri fakaj aŭ aliaj aferoj en la Internacia Lingvo.



**Emil
Nestor Setälä
(1864-1935)**

Simila renkontiĝo ja okazis antaŭ unu jardeko: Balkányi raportis (*Hungara esperantisto*, 1970, Vol. 10, n-ro 7, p. 5) pri tritaga lingvista festo en la hungara urbo Székesfehérvár en 1970, kiam la hungara akademiano Géza Bárczi interparolis en Esperanto kun Collinder kaj Ariste.

Kiom da esperantistoj-finnugristoj ĉeestos la 5an Kongreson? Ĉu ili kaptos la okazon utiligi Esperanton? La pordo ja estas malfermita por ili, ĉar laŭ la kongresa regularo, oni rajtas prezenti sekcian prelegon en iu konvena lingvo. Nun estas la tempo ree atentigi, ke Esperanto estas la plej konvena lingvo por finnugristoj.

Bernard Golden

* Setälä, Emil Nestor. 1929. "Maailmakieelikysymys". *Journal de la Société Finno-Ougrienne*, Vol. 43. Franclingva eldono: 1932. "La question de la langue universelle". *Journal de la Société Finno-Ougrienne*, Vol. 43.

Ĝi sufiĉas kaj ekscesas

Recenzas Aldo de' Giorgi (Italio):

Libro de romanoj, de Vilmos Benczik (1945-). Buda-pest: Hungara Esperanto-Asocio, 1979. 229p. 18cm. ISBN 963 571 063 1.

Per ĉi tiu libro ankaŭ la Esperanta (pseŭdo)literaturo havas sian unuan diĝeston. Ĉar temas fakte pri la koncizigo, en 230-paĝa libro, de ses romanoj: du de Henri Vallienne (1854-1909) kaj kvar de Heinrich August Luyken (1864-1940), aperintaj inter 1907 kaj 1924.

Deklarita celo de Vilmos Benczik, reverkinto de ĉi tiu kompendio, estas liveri — ĉefe al studemuloj sed ankaŭ al aliaj scivolaj legantoj — sufiĉe ampleksan resumon (kun inkluzivitaj ekstraktoj el la originaloj) de tiuj "historiaj" verkoj, kiuj estas finfine la unuaj veraj romanoj aperintaj originale en la Internacia Lingvo.

Tamen, post la legado, mi ne povis deteni min de la perplekso: ĉu penvaloris? Ĉar en ambaŭ kazoj (kvankam pli ĉe Vallienne) temas pri unu el la plej degenerintaj ĝenroj rakontaj, tiaj, ekzemple, kiaj furoris en la komenco de nia jarcento, kiam pluraj senskrupulaj gazetoj disĵetis ilin felietone en la avidajn faŭkojn de la tiamaj subkulturitaj amasoj. Ĉiukaze nomi ilin literaturo signifus kotentiri tiun nomon.

La romanoj de Vallienne estas tipaj specimenoj de tia malvirto, ili estas stinka poto, kie miksiĝas, sen iaj ajn verŝajno, kohero kaj minimuma arto, la plej nekredblaj kaj mallogikaj okazaĵoj kaj homfiguroj. Ĉiaj ingrediencoj taŭgas: ĉielaj virtoj kaj inferaj pekoj, krimoj kaj heroaĵoj, intrigoj, friponaĵoj ktp. Ĉio kirlita en senhalta, kaosa kaj rebusa sinsekvo. Tragike mortintaj homoj abrupte reaperas. Anĝelaj virinoj perfidas, adultas, murdas sed . . . restas anĝelaj. Geedzaj paroj intermiksiĝas. Konfuzo de identecoj. Mizeruloj fariĝas milionuloj kaj inverse. Noblaj grafoj, dukoj, markizoj kaj (minimale) industrikapitanoj abundas, kiel devige en tiaj fatrasoj. Kaj tiel senfine plu.

En la antaŭparolo Benczik asertas, ke Vallienne iel anticipas nian postan poramuzan prozon. Tio parte veras, sed mi certas, ke ĝi ne estis en la intencoj de la aŭtoro.

Nur pri la lingvouzo de Vallienne mi ne estus tiel draste kritika, kiel la plej multaj komentintoj. Se ni pensas, ke la libroj estis verkitaj en la unuaj jaroj de nia jarcento, lia lingvaĵo fariĝas preskaŭ akceptebla, eĉ kun la svarmo da naive banalaj kunmetaĵoj kaj frazturnoj, cetere pli-malpli komunaj al ĉiuj verkistoj de tiu pionira periodo.

Pri la romanoj de Luyken pli-malpli validas la samaj rimarkoj, kiel pri Vallienne, kvankam ili estas iom malpli kaprompe komplikaj kaj montras eĉ kelkajn navajn pretendojn pri psikologia esploro de la karak-

teroj. Tamen, malgraŭ tiuj stilistikaj avantaĝoj, la verkoj de la german-angla aŭtoro fariĝas pli tedaj pro la vere asfiksia dozo da moralismo enmetita. Ĉiupaŝa emfazo de ia ekstreme bigota pieco, de la plej fanatika religiemo evangelia (tamen iom superstiĉe enmiksitaj kun diversspecaj animismo, spiritismo kaj orienteca okultismo), tiu daŭra, kaj evidente hipokrita, enŝovo de tiom da predikoj, igas la legadon ne nur enuiga sed eĉ naŭza.

Krome, ŝajnas al mi elflari en Luyken ian snoban senton de supereco pri la ĝermana raso. Jen ekzemplo: Evangelia, angla misiistino kaŭzas la morton de nobla kaj heroeca rusa ribelulo, sed tio estas ja neatentinda bagatelo, gravas nur la savitaj "principoj" kaj la amo de la superrasuloj!

Laŭ la komentintoj la lingvaĵo de Luyken estas tre bona, laŭ iuj eĉ "modela". Ni nur konsideru, ke li verkis 10–15 jarojn post Vallienne. Persone lian prozon mi ne konsilus al miaj kursanoj kiel imitindan.

Pri la laboro de Benczik, mi diru, ke li atente ĝin faris. Per ĝi niaj filologoj kaj bibliografiistoj havas taŭgan studmaterialon kaj povos ŝpari al si la tempon kaj ĝenon legi la originalajn kaĉbulojn.

Mi nur esperas, ke al neniuj eldonistoj venos en la kapon represigi la ĉi-koncernajn originalojn; la diĝesto de Benczik ja sufiĉas kaj ekscesas.

Mendu ĉe UEA: 15,00 (por Nederlando 15,60) gld., plus sendokostoj 10%.

Rekreo kiel traduko

Recenzas Baldur Ragnarsson (Islando):

Blinda ermito, de Maurizio Caprile. Elitaligis Mauro Nervi. Pisa: Edistudio, 1979. 60p. 21cm. ISBN 88 7036 004 0.

Maurizio Caprile estas verkinto de pluraj poeziaj verkoj, kaj *Blinda ermito* (titolo laŭ unu el la poemoj) estas sortimento el ĉiuj liaj poemaroj, elektita de la tradukinto, entute 45 poemoj. Caprile daŭrigas la ligurian-toskanian poezion, kiu produktis i.a. la Nobel-premiiton Eugenio Montale. Kiel Montale (precipe en *Ossi di Seppia*), li serĉas simbolojn en la roka pejzaĝo de Liguria. Li tamen ne emas doni al tiuj simboloj superregan enhavon de senelira dezerteco, sed preferas konstati esperigajn facojn de konsolo en la tutaĵa perceptaro: en la lumo, riĉaj koloroj, ŝirminvitaj niĉoj de la rokoj. La "Vince il male..." ("malbono venkas") de Montale ne trovas reeĥon ĉe Caprile, li estas vivaserta poeto, kiu ĉiam trovas eliron el la simbolaj dilemoj, liaj kreemaj ŝatoj facile pozitivigas tutaĵojn fronte al negativaj ingrediencoj. Ekestas la demando, ĉu tio ie-tie emas malplifortigi lian arton, ĉar densaj antitezoj ja facile donas artefaritan impreson per si mem. Miatakse, Caprile tamen bele sukcesas validigi eĉ plej antitezajn motivojn per la delikata povo de sia komunika sincero.

La stilo de Caprile estas klare decidita de la asociadaj latentoj de liaj ĉeftemoj (kiel ili aperas en tiu ĉi libro):

naturu kaj amo. Liaj poemoj estas kolektoj de intime percepteblaj motivoj, kunligitaj per konkretca etoso, kreita parte de la elnombritaj eventoj, parte de la psikologia rilateco inter la motivoj mem. Tiu ĉi metodo de konkreta disbranĉiĝo sur subjektivaj niveloj estas konstatebla eĉ en la plej simplaj poemoj; mi prenas, iom hazarde, kiel ekzemplon la poemon "Tundro" (p. 14):

*Iun nokton mi falis en la tundron
kaj trinkis ĝian akvon malpuran.*

*Mia rigardo serĉis arbon, lumon,
je l' magio mi esperis, kaj ploris.*

*Sed trajna fajfo tuje
min ekvekis al la vivo,
al la ruĝaj vangoj de l' drinkantoj,
al la patrino sino,
al la librujoj de la kunlernantoj.*

Tiel mi flugis de la marĉo ĝis viaj brakoj.

Ĉi tie ni havas antitezajn motivojn el la naturo: la tundron, la malpuran akvon, la marĉon; arbon, lumon, kaj el homaj aktivecoj kaj vivo: la trajnan fajfon, la ruĝajn vangojn, la patrinan sinon, la librujojn. La nura elnombrado tuj efikas simbolece, vekante ideojn pri kontrastoj. Tiuj simboloj estas sinsekve kunligitaj per emocie gvidataj agoj, kiuj siavice kreas diversnivelan psikologian koheron, kontribuantan al la tutaĵa tema etoso. La apliko de tiu ĉi metodo estas laŭ mi konstatebla en la poemaj substrukturoj ĝenerale, sed kompreneble ĝi disvolviĝas eksteraĵe en tre variaj manieroj, ofte en bele originala kaj pripensinda figura lingvo.

Estas ankaŭ evidente, ke liberaj versoformoj aparte konvenas al tia "disbranĉiĝa" modelo. Ja tiajn Caprile senescepte uzas, kio starigas nin fronte al la formredona arto de la tradukinto, kiel li sukcesas transdoni la teme alsimpatiajn versojn de la originalo. Oni povas priskribi la versostrukturojn de la poezio de Caprile kiel varie foriĝeman retiriĝon disde konvenciaj modeloj, liaj versoj estas aŭ limitaj je la sintaksa frazo kun parolritme dismetitaj akcentoj, aŭ aranĝitaj en malpli longaj apartaj unuoj, kiuj sencemfaze konstruiĝas en kompletajn frazojn. Liajn versojn oni eble prefere nomu 'liberigitaj' (diversgrade for de konvencioj), pli ol 'liberaj'. Mauro Nervi ĉi tion plenkonscie kaj perfekte redonas en sia traduko, konforme al la postuloj de la Esperanta frazoritmo.

Tiu ĉi malgranda poemkolekto estas senmanke aŭtentika prezento de poezia arto en Esperanto. Tion certigas kaj la subtile multifaceta valoro de la originalo, kaj ĝia **rekreo**, ĝia **interpreto** fare de Mauro Nervi, kiu ĉi tiun **novan verkon** transdonas al ni per profunda kompreno, per majstra tekniko. Tiu ĉi debuto de Nervi kiel tradukisto ne malpli brilas ol lia debuto

originala antaŭ iom pli ol unu jaro per *La Turoj de l'Ĉefurbo*.

Mendu ĉe UEA: 9,00 (por Nederlando 9,36) gld., plus sendokostoj 10%.

Vivo de optimisto

Recenzas Ulrich Lins (Tokio):

Ĉiu ĉiun; Sep jardekojn en la Esperanto-movado; Memoraĵoj de 86-jara optimisto, de Teo Jung (1892 -). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1979. 400p. Ilus. 21cm. Movado 8. ISBN 90 6336 011 8.

La nomo de Teo Jung estas tre bone konata en nia Movado, ĉar li estas la fondinto de *Heroldo de Esperanto*. En aprilo 1920 aperis la unua numero de *Esperanto Triumfonta*, kaj komence de 1925 la revuo ricevis tiun nomon, sub kiu ĝi estas konata ĝis la hodiaŭa tago. Ĝis la fino de 1961 Teo Jung mem estis ankaŭ la ĉefredaktoro de *Heroldo*. Do, li povis dum multaj jaroj liveri al la esperantistoj aktualajn informojn pri la progreso de Esperanto kaj neniam ĉesis forte instigi ilin al vigla aktiveco. Teo Jung nun verkis la priskribon de sia vivo, kiu estis ĉiam dediĉita al Esperanto. En bela, flua stilo li rakontas siajn ĝojojn, sed ankaŭ la ĉagrenon, kiun li havis pro *Heroldo*. Ĉiu, kiu estis abonanto de la gazeto, longe eĉ semajne aperanta, sub la redakto de Jung, kaj nun legas liajn memorojn, certe devos konkludi: Li estas samideano en plena senco de la vorto.

La subtitolo estas "Sep jardekojn en la Esperanto-movado. Memoraĵoj de 86-jara optimisto". Efektive, lia plej admirinda trajto estas nedetrubla optimismo. Tion eble plej klare montras la multaj poemoj, kompreneble de li verkitaj, kiujn Teo Jung lerte enplektis en sian tekston.

Krome, Teo Jung scias ĉiam denove amuzi la leganton per bonaj ekzemploj de sia humuro; li ja estas rejnlandano. Kaj ni ofte kun rideto observas, kiel li dum Universalaj Kongresoj, kiam oni multe diskutis pri organizaj problemoj de la Movado, kvazaŭ senzorge ekskursas por ĝui la turismajn vidindaĵojn. Pri tio lia provizo de anekdotoj estas neelĉerpebla. Sed ni ne eniru ĉi tie detalojn, ĉar ĉiu povas ilin legi mem.

Ĉe tia granda verko kutime estas neeviteble, ke enŝteliĝas eraretoj, sed mi rimarkis nur unu: sur p. 154 la aŭtoro mencias siajn rilatojn kun Robert Kreuz, forgesante klarigi, ke la direktoro de UEA mortis jam en 1936. Tion en dua eldono necesus korekti. Preserarojn mi ne trovis. Nur la teksto presita sur paĝoj 274 kaj 275 estas identa.

Fine mi volas aldoni, ke la libro havas ankaŭ plaĉan eksteraĵon. Entute do: Jen verko varme rekomendinda al ĉiu, kiu deziras rekte informiĝi pri la vivo de homo, kiun ni povas senrezerve nomi unu el la veraj apostoloj de nia afero.

Mendu ĉe UEA: 36,00 (por Nederlando 37,44) gld., plus sendokostoj 10%.

LASTE APERIS. . . mankas en ĉi tiu numero, ĝi mankos ankaŭ en la maja revuo, ĉar en junio ni atendas la aperon de la nova KATALOGO

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, 6A Eastcombe Road, Weston-super-Mare, Britio BS23 2TQ

SEMINARIO DE STRASBURGO:

Je alies kostoj

LA PASINTJARA SEMINARIO, "Interŝtataj unuiĝoj — kiucele?", kies fina raporto nun estas havebla, okazis laŭ la konata modelo de TEJO-aranĝoj subvenciitaj de ekstermovadaj instancoj. Ĉi-jare TEJO provas ion alian: De la 15a ĝis la 22a de junio 1980 la Eŭropa Junulara Centro (EJC) de la Eŭropa Konsilio en Strasburgo (Francio) estos je la dispoŝo de trideko da geaktivuloj el niaj landaj sekcioj, kiuj partoprenos stud-semajnon pri la temo "Internacia komunikado — aplikado de Esperanto".

Du aferoj rimarkindas: Unue, la strasburga Centro, tre konvena, moderna konferencejo, ne kostas al TEJO eĉ unu centimon. La Eŭropa Konsilio disponigas ĝin, je propraj kostoj, al internaciaj organizaĵoj. Due, malkiel niaj seminarioj en la lastaj jaroj, tiu ĉi traktos movadan temon. Kreskis la konstato, ke TEJO devas plifortigisian internacian strukturon, pliklarigi sian propran celaron, por povi sukcese daŭrigi ankaŭ siajn eksterajn rilatojn en la okdekaj jaroj. Kaj ke ekstermovada instanco kiel EJC pretas gastigi seminarion pri Esperanta temo estas per si mem atingo.

TEJO jam alvokis siajn sekciojn en landoj membrantaj en la Eŭropa Konsilio elekti po du-tri gvidantojn por reprezenti ilin en la seminario. La Centro pagos ankaŭ la partoprenon de malgranda nombro da gastoj el orienteŭropaj landoj. La programo definitiviĝas, en konsulto kun EJC mem. Jam promesis prelegi Renato Corsetti, Claude Gacond kaj Claude Piron.

La temo havos tri emfazojn: kreo de pliaj parolantoj, kiel krei el parolantoj agantojn, aplikado de Esperanto (kiel kaj pri kio agi). Oni diskutos atente ankaŭ la jenan temserion (ĉiam rilate al la junularo): varbado al la kurso, instruado de la lingvo, funkciigo de lokaj grupoj, rolo de landa sekcio, praktika aplikado de Esperanto, eksteraj rilatoj. Raporto estos poste eldonita, kaj TEJO esperas, ke ĝi pli klare montros al la landaj sekcioj, kaj al TEJO mem, la vojon antaŭen en novan fazon de agado.

ij

GEJ-ludoj

SENDEPENDE de la hamburga projekto, kiun ni priparolis en nia novembra numero, sed kvazaŭ paralele kun ĝi, naskiĝis bonega iniciato de Germana Esperanto-Junularo, kiu ĵus eldonis libreton *Lingvaj ludoj de GEJ*. Ĝi konsistas el aro da lingvaj ludoj, taŭgaj por instruado de Esperanto aŭ alia uzo en klaso aŭ klubo, kiam

Raporto pri IŜUK

"Interŝtataj unuiĝoj — kiucele?", seminario de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO: fina raporto nun aperis. 32 paĝoj da prelegresumoj, laborgrupaj raportoj, ilustraĵoj, demandoj. Per aĉeto de ĉi tiu raporto ankaŭ vi povas partopreni en la diskuto de grava kaj aktuala temo, lanĉita sed neniel elĉerpita de la seminario. La raporto estas havebla ĉe TEJO kaj la Libroservo de UEA, prezo 4,20 gld., plus sendokostoj. Angla traduko estas ankoraŭ preparata. 16-paĝa franca resumo estas presita kaj baldaŭ haveblos kontraŭ 3,00 gld., plus sendokostoj.

la pli serioza parto de la programo estas finita. La kolekto, kiun redaktis Elisabeth Kuhl, enhavas kvindek ludojn. Ili estas utile aranĝitaj laŭ sia taŭgeco por komencantoj, tiuj kiuj atingis mezan lingvan nivelon, aŭ por fluaj parolantoj. Pliaj ludoj estas promesitaj. La kolekto estas havebla ĉe la Libroservo de UEA: 6,00 gld. plus sendokostoj.

Kalkulu pri IJF

EN GORICIO, Italio, de la 3a ĝis la 7a de aprilo 1980, Itala Esperantista Junularo okazigis sian 4an Internacian Junularan Festivalon (IJF). Kiel rimarkis Stefan MacGill, en parolado dum la solena malfermo, ja multaj junularaj renkontiĝoj povas pro regula ĉiujareco tiel arogi al si numerserion. Sed, per sia kvarjara tradi-



La lokaj kaj regionaj amaskomunikiloj tre atente sekvis la Festivalon kaj amplekse raportis pri ĝi. Tio eble estis la plej sukcesa trajto de la aranĝo en Goricio.

cieto IJF komencas esti kalkulata — almenaŭ en la okcidenta Eŭropo — apud la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario de Germana E-Junularo. Cento da partoprenantoj en la 4a IJF, krom gastigi la TEJO-estraron, okupiĝis pri bildartoj, en programo kiun tamen superregis la kanzonaj talentoj de Ĝanfranko kaj Marĉela. Goricio troviĝas ĉe la itala/jugoslava landlimo, kaj aparte interesa programero estis interŝanĝo de spertoj inter anoj de la slovena minoritato tie kaj la katalunaj esperantistoj, kiuj spicis la tutan IJF per sia aparta etoso. La organizaj malglataĵoj de antaŭaj jaroj ne ripetigis, kaj la 4a IJF sukcesis.

ij

Belgio

- La 1-an de februaro, en la Politeknika Fakultato de Mons, kunprelegis prof. G. Boulanger pri la netaŭgeco de naciaj lingvoj por internacia uzo kaj prof. R. Molle pri la solvo de tiu problemo per la Internacia Lingvo. Tiu prelego okazis enkadre de la "kolokvoj G. Van Leberghe", kiujn regule ĉeestas multaj el la fakultatanoj.

Koreo

- De la 7a ĝis la 25a de januaro okazis publika Esperanto-kurso en Pusan. Finlurnis 44 komencantoj, plejparte junaj. Pusan estas havenurbo, al kiu ĝis nun mankis organizita Esperanto-agado. En la ĉefurbo Seŭlo okazis en februaro du kursoj sub gvido de So Gilsu.

Soveta Unio

- En la Domo de Amikeco kun Aliandaj Popoloj en Moskvo, la 25an de februaro, Asocio de Sovetiaj Esperantistoj okazigis vesperon pri la Internacia Lingvo. Laŭplane, fine de aprilo aperos la sepa Esperanta suplemento de la semajna gazeto *Moskvaj novaĵoj*; en majo sekvos la oka.



- **Kanado:** La foto montras la urbestron de Vancouver (dekstre) kiam li subskribas invitleteron por la Dua Pacifika Esperanto-Kongreso (vidu anoncon sur la lasta kovrila paĝo). Maldekstre staras Willy du Temple, prezidanto de Kanada E-Asocio, kaj Marie Zacherl, sekretariino de la Kongreso.

Italio

- La tutlanda televido dissendis programon pri Esperanto dum kvaronhoron la 19an de decembro. Ĝi konsistis el intervjuo kun la senatano Alberto Del Nero (prezidanto de la Interparlamentara Grupo "Amikoj de Esperanto"), raporto pri elementa lernejo en Cesena (tie in-

Bibliotekoj

- Ni jam antaŭe skribis pri la Urba Publika Biblioteko en Kortrijk (Belgio), kiu havas grandan kolekton de Esperantaj periodaĵoj. Nun venas la apuda foto, kiu elokvente ilustras la grandecon kaj staton de tiu kolekto. En la Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet — tiel oficiale nomiĝas la kolekto — troviĝas 3 369 binditaj jarkolektoj de diversaj Esperantaj periodaĵoj. Se ni aldonas, ke pliaj 3 071 jarkolektoj atendas bindon kaj kompletigon, vi komprenos, ke fakte temas pri unu el la plej grandaj kolektoj ekzistantaj. Kaj, ĉio ĉi dank' al la sindediĉo kaj persistemo de unu homo: C. Vanbiervliet, Oudenaardsesteenweg 158, B-8500 Kortrijk, Belgio.

Entomo-taksonomio

- Sub la titolo *Entomotaxonomia* aperis en oktobro 1979 la unua ĉina periodaĵo pri la klasigo de insektoj. Ĉefredaktas ĝin ĉina esperantisto, renomata entomologo, prof. Chou Io en Vukung, Ŝansi. La redaktantaro ampleksas fakulojn el Ĉinio, Danlando, Hinda Unio, Italio, Japanio kaj Usono. Artikoloj estas ĉefe en la ĉina kun resumo en ses lingvoj, inter ili Esperanto.

Unuiĝintaj Nacioj

- La staba gazeto de la Sekretariejo de Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko, *Secretariat news*, aperigis la 29an de februaro artikolon pri Esperanto kaj la kreskantaj ligoj inter UEA kaj Unesko. La artikolo emfazas, ankaŭ per foto de kursanoj en la nova oficejo de UEA en Nov-Jorko, ke Esperanto estas vivanta

fanoj lude lernas Esperanton) kaj kanzonoj de Gianfranco Molle kaj Marcella Fasani. La programon kunmetis Renato Corsetti.

Francio

- Socialista parlamenta iniciato en la Nacia Asembleo registrigis lastatempe leĝproponon favoran al la Internacia Lingvo. Laŭ tiu propono, Esperanto estus akceptata en la dua grada kaj supera lerneja instruado kiel elektebla studobjekto. La leĝproponon subtenis 114 deputitoj.

Fake



reto de interhomaj kontaktoj. Per tiu artikolo la Nov-Jorka Oficejo de UEA kvazaŭ debutas en la sekretariejaj rondoj, kie necesas konsciigi la homojn ne tiom pri la lingvo-problemo kiom pri ĝia solvo.

Fervojistoj

- La ĉi-jaran internacian fervojistan Esperanto-skisemajnon (de la 26a de januaro ĝis la 2a de februaro) organizis ges-roj Gimelli en Plan/Val Gardena, Italio. Venis el 9 landoj pli ol cento da partoprenantoj. La loĝaj kaj skiaj kondiĉoj estis bonegaj. Komplementis vesperaj programoj kun filmoj, diapozitivoj, skeĉoj kaj kostumbalo.

Studsemajnoj

- En la jugoslavia feriejo Primošten, Eŭropa Klubo okazigos Some-rajn Internaciajn Universitatajn

Semajnojn (SIUS) de la 12a ĝis la 24a de julio. Jam estas certaj sekcioj pri: juro, ekonomiko kaj turismo, pedagogio kaj kibernetiko, lingvistiko kaj interlingvistiko. La laborlingvoj en ĉiu sekcio estos Esperanto kaj nacia(j) lingvo(j). Oni aparte atentis lingvajn problemojn en la diversaj sciencoj. La ĉi-foja SIUS koincidas kun la 20-jariĝo de la esperantista kampadejo en Primoŝteno.

Tradukado

- En la internacia tradukista gazeto *Babel*, eldonata sub aŭspicio de Unesko, aperis en la numero 3/1979 artikolo de Vilmos Benczik pri la rolo de Esperanto kiel pontolingvo rilate al la aziaj literaturoj. *Babel* estas la organo de Internacia Federacio de Tradukistoj. Ekde 1980 regule enestis en ĝi unu-du-paĝa rubriko "Esperanto-novaĵoj".

Sonrevuo

- La 3a numero de ĉi tiu unika "revuo", kiu estas sonbenda, aperis. Eldonas Blindula Esperanto-Asocio por Kroatio (Jugoslavio). La temo de ĉi tiu 90-minuta numero estas rondvojaĝo de Zdravka Metz tra Japanio. Surestas intervjuoj kun pluraj japanaj esperantistoj, inkluzive gejunulojn. La sonbendo estas havebla pere de la Magnetofona Servo de UEA (R.R. 1, Bailieboro, Ontario, Kanado K0L 1B0).

Literaturo

- La monda ŝekspira bibliografio (College of the Liberal Arts, Department of English, Pennsylvania State University, University Park, PA 16802, Usono) registras informojn pri tradukoj de verkoj de Shakespeare i.a. en Esperanton. Eldonistoj de tiaj tradukoj bonvolu estonte informi al tiu adreso pri novaj aperaĵoj.
- Ĵus lanĉita kroata literatura revuo *Ponto* aperigos en 13 nejugoslavaj lingvoj artikolojn pri la kroata literaturo kaj pri ĝiaj rilatoj kun la ekstera mondo. La revuo interesiĝas ankaŭ pri Esperantaj kontribuadoj, kaj honorarios eventualajn aŭtorojn. La unua numero jam enhavas superrigardon (de M. Ĝivoje) pri tradukoj el jugoslaviaj literaturoj en Esperanton. Eldonas la revuon Societo de Kroataj Verkistoj, Trg Republike 7, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

Kulturo

- Ĉeĥa Esperanto-Asocio preparas la 4an Kulturajn Festivalon en la urbo Opava. La festivalo, kiu okazos en septembro, prezentos el la tuta mondo kulturajn grupojn, unuopulojn kaj literaturajn verkojn. Estos premioj. Informpetojn bonvenigas Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, CS-11000 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.

Turismo

- La asocio Monda Turismo fariĝas dekjara en 1980. Ĝi planas ĉi-jare eldoni antaŭ la UK gvidlibron por esperantistaj ĉiĉeronoj kaj ekskursgvidantoj, kiun verkas Max Finkenzeller. La 6a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo okazos en novembro 1980 en Bydgoszcz kaj Gdańsk, Pollando.

Persono

Ariste

- La elstara soveta lingvisto, prof. d-ro Paul Ariste, celebris lastatempe 75-jariĝon. Pro tiu okazo aperis pluraj artikoloj pri kaj intervjuoj kun li. Preskaŭ ĉiuj mencias lian Esperantan agadon. Tion faras ankaŭ 55-paĝa monografio *Akademiano Paul Ariste*, kiu aperis en kvin lingvoj. Grava intervjuo kun Ariste aperis en la ruslingva semajna revuo *Ogonjok* (preskvanto ĉ. du milionoj). Intervjuis A. Ĥarkovskij; temis ĉefe pri la monda lingvo-problemo, kaj la rolo kiun povas ludi Esperanto en ĝia solvo.

Orsolini

- Laŭ invito de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, Andrée Orsolini kaj Clément Tholet, reprezentante du belgajn Esperanto-organizaĵojn, pasigis semajnon en Soveta Unio fine de 1979. Ili vojaĝis de Moskvo al Taŝkento kaj Samarkando en Uzbekistano, sudoriente de Soveta Unio. Multaj esperantistoj moskvaj kaj uzbekaj renkontis ilin kaj interŝanĝis kun ili opiniojn.

Aleksiev

- Nikola Aleksiev ricevis antaŭ ne longe en Prago la medalon "Julius Fuĉik" pro siaj ĵurnalistaj meritoj. Li estas la kvara bulgaro, kiu ricevis tiun distingon. Pasintjare, Aleksiev ricevis de la Ŝtata Konsilantaro de sia lando la titolon "Heroo de socialisma laboro", kio estas la plej



alta distingo en Bulgario. N. Aleksiev estis dum longa tempo prezidanto de BEA kaj MEM, prezidanto de la LKK de la 48a kaj 63a UK, kaj (ankoraŭ nun) komitatano de UEA.

Oficiala informilo

N-ro 534

UNUA ĈEFDELEGITO POR GERMANA DR

Unuafoje ekoficis Ĉefdelegito de UEA por Germana Demokratia Respubliko. Tiun oficon plenumos s-ro Jürgen Hamann, Alfred-Kästner-Str. 72, DDR-7030 Leipzig. Laŭ la nova Statuto de UEA, la Estraro mem nomas ĉefdelegiton aŭ peranton interkonsente kun la koncerna aliĝinta landa asocio.

ADRESSANĜO POR AŬSTRALIO

S-ro Kenneth G. Linton, ĉefdelegito de UEA por Aŭstralio, havas novan adreson: 4/2 Lyons Street, Glenhuntly, Victoria, 3162 Aŭstralio.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Francio: Pastro Degrelle. Hispanio: J. Azcuénaga Vierna; M. Gutierrez Aduriz.

SOCIETO ZAMENHOF 1980

AŬSTRAL: 108 A. Einihovici. BELG: 109 E. Ernst; 110 Jules Verstraeten. BRIT: 111 W.G. Atkinson; 112 C.M. Houghton. FRANC: 113 Gaston Waringhien. KAN: 114 G. du Temple. NORV: 115 Margarete Landmark; 116 Olav Reiersøl. NOV-ZEL: 117 J. Wilson. SVED: 118 Jim Hornö. SVISL: 119 H. Raymond; 120 Frieda Welter. US: 121 Margaret Barkley; 122 William R. Harmon; 123 Mark Starr. FR GER: 124 Felix Epstein; 125 Helmuth Welger. BELG: 126 J. Bernaerts-Toussaint; 127 s-ino Van Ginderen-Martens; 128 Clara Peeters. JAP: 129 Hideo Shinoda. NED: 130 H.M. Butter; 131 Teo Jung; 132 B. Kapert; 133 H.C. Luyke. SVED: 134 Amy H.L. Nilsson. US: 135 B.J. Balcar; 136 Stefan Chobanoff; 137 Affonso Correa; 138 W. J. Ford; 139 Ĝiĝi Harabaĝiu; 140 M. Lewin; 141 D.L. Mason; 142 W.C. Nelson; 143 Rose Norlund; 144 V. Palermo; 145 Jonathan Pool; 146 Julie L. Regal; 147 Bruce Arne Sherwood; 148 Robert A. Svenson; 149 Douglas B. Swett; 150 Eug. H. Thompson; 151 Ken Tomson; 152 Martha Ann Walker; 153 L.A. Walther.

Rimarko: La Centra Oficejo pardonpetas al pluraj membroj de Societo Zamenhof, kiuj longe devis atendi la ĉi-supran anoncon pri sia membriĝo. La prokrasto okazis pro kelkmonata malsano de la koncerna oficisto.

DONACOJ 1980 (Gld.) ĝis la 29a de februaro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Hispanio: A. Fighiera-Sikorska 16,00. Nederlando: R. Moerbeek 50,00; W.A. Verloren van Themaat 50,00; M.A. v.d. Waal 25,00; S.A.K. v.d. Zee 25,00. Sumo ĉi-jara 321,25.

FONDAĴO CANUTO: Hungario: H. Negash 17,20. Sumo ĉi-jara 620,40.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: FR Germanio: Marie Laade 300,00; H. Meijer 16,56; E. Siegert 11,04. Sumo ĉi-jara 327,60.

FONDAĴO TEJO: Britio: K.A. Sly 87,00. Nederlando: J. Th. de Goeij 10,00. Sumo ĉi-jara 97,00.

ĜENERALA KASO: Francio: R. Lemaire 56,48. FR Germanio: M. Gründler 55,19. Norvegio: K. Gustavsen 40,92. Diversaj malgrandaj 16,09. Sumo ĉi-jara 1 047,87.

NOV-JORKA OFICEJO DE UEA: Patrono: FR Germanio: Marie Laade 1 000,00. Amiko: Nederlando:

G.M.J.B. Peet 100,00. NOTO: Listo de donacoj pagitaj rekte al la Nov-Jorka Oficejo (temas pri pluraj miloj da dolaroj) aperos en niaj sekvan-taj revunumeroj.

PATRONOJ DE TEJO: 18 H.M. Schippers, Nederlando. 19 E. Gimeno Palau, Hispanio. 20 D. Despiney, Francio. 21 B. Despiney, Francio. 22 R. Jullien, Francio. 23 J. Azcuénaga Vierna, Hispanio. 24 Margrete Landmark, Norvegio. 25 T. Jansson, Svedio.

Al ĉiuj tre koran dankon pro la mal-
avara financa apogo! UEA

Nekrologoj

PAUL KEMPENEERS (1895-1979) mortis la 23an de decembro en Bruselo, Belgio. D-ro Kempeneers estis vicprezidanto de UEA de 1947 ĝis 1953. Li grave rolis en la medicinistaj rondoj, kie li estis de 1927 ĝis 1937 ĉefsekretario de Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio kaj eldonisto de *Internacia medicina revuo*. Krome, d-ro Kempeneers (specialisto pri ortopedio) ofte aldonis al siaj alilingvaj artikoloj Esperantajn resumojn. En 1978, Universala Medicina Esperanto-Asocio honoris lin per arĝenta medalo.

MILDA JAKUBCOVÁ (1899-1979) mortis je la 14a de oktobro. Ŝi estis latva poetino, kiu vivis en Ĉeĥoslovakio. Kune kun Elvira Lippe ŝi redaktis la poemaron de J. Rainis kaj la volumon *Latva poezio*. Milda Jakubcová multe tradukis el la latva literaturo. Ŝia *Estrado de animaloj*, kolekto de cent fabloj, aperis en 1970 en Banská Bystrica, Ĉeĥoslovakio.

HANS BREITENBACH (1924-1980) mortis en Berlino la 19an de

februaro. Li estis redaktoro de *Berlina informilo* ekde julio 1953 kaj vicprezidanto de Esperanto-Ligo Berlin ekde 1956. Kiel la kontaktadresulo kaj sekretario de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, Breitenbach redaktis kaj parte produktis ankaŭ ĝian organon *Esperanta ligilo*. Li verkis la kontribuojn pri la blindula Esperantomovado en *Esperanto en perspektivo*.

JOSÉ SANTAMARÍA NEIRA (1887-1979), dojeno de la esperantistoj en Bilbao, Hispanio, mortis la 7an de decembro. Esperantistiĝinte en 1905, li kunfondis la lokan grupon en Bilbao en 1906. Inter 1909 kaj 1913 li redaktis la gazeton *Nova sento* en Bilbao; liaj kontribuoj aperis sub la pseŭdonimo "Virgilio".

WALTER VON WALDOWSKI (1891-1980) mortis en Berlino la 4an de marto. Li estis esperantisto ekde 1920. Profesie instruisto, li gvidis kursojn, estis membro de faka organizaĵo kaj apartenis al ekzamina komisiono. W. von Waldowski (kaj la vidvino) dum pluraj jaroj membris en Societo Zamenhof kaj alimaniere apogis UEA.

SILJA TIETTI (1959-1980), sekretariino de Finnlanda Esperantista Junulara Organizo kaj de LKK de la 36a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, forpasis en la aĝo de 20 jaroj, la 16an de januaro en Helsinko. Ŝi estis ankaŭ unu el la ĉefaj animantoj de Esperanto-Teatro de Finnlando.

NUR DUM UNU JARO PRESKAŬ TUTA MILO DA HOMOJ OPINIIS, KE LA LIBRO VALORAS AĈETON:

JOHN WELLS:

Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1978. 76p. 23cm.
ISBN 92 9017 021 2. Prezo: 12,00 (por Nederl. 12,48) gld.

THORSTEINN THORSTEINSSON (1880-1979), kiu mortis la 22an de februaro, estis korifeo de la Movado en Islando kaj dojeno de Veterana Esperantista Klubo. Baldaŭ post sia esperantistiĝo en 1899 li komencis aperigi poresperantajn artikolojn, kiuj estis sufiĉe varbaj pro lia faka reputacio kiel ekonomikisto. Li verkis la unuan islandan lernolibron de Esperanto; ĝi aperis en 1909 kaj estis reeldonita en 1927. Tiujare li fariĝis prezidanto de la unua islanda esperantista societo (en Rejkjaviko). D-ro Thorsteinsson prezidis ankaŭ la unuan Islandan Esperanto-Asociation, fonditan en 1931. Konatiĝinte



kun Zamenhof en la kembriĝa (la 3a) UK de 1907 kaj spertinte ankorau la 62an UK en 1977, d-ro Thorsteinsson travivis multajn generaciajn stafetojn. Estis nur unu el la multaj honoroj en lia vivo, ke, refondiĝinte en 1950, Islanda Esperanto-Asocio elektis lin Honora Membro.

ekzameno

Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 34

(pri la demando vidu nian martan numeron)

- Unufingraj melodioj de William Auld, eldonita en 1960, kun skizo pri la aŭtoro verkita de John Francis, enhavas la longan poemon "Konĉerto por unu fingro kaj orkestro" kaj la dramon "Kvazaŭ birdoj konstruas".
- Du malsanoj en Esperanto de H.A. de Hoog aperis en 1954. La aŭtoro apogas sian argumenton pri la ĝusta uzo de korelativoj per abundo da ekzemplaj frazoj.
- SAT eldonis en 1956 Tri verkoj de Volter (Voltaire, 1694-1778). Lanti tradukis el la franca lingvo "Kandid", "Zadig" kaj "La senartifikulo".
- Kvin elementoj estas la titolo de poezia verko de Edwin de Kock, datiĝinta de 1957-1958, kiun li eldonis en 1970. La titoloj de la kvin partoj estas "Akvo", "Aero", "Tero", "Fajro" kaj "Tempo".
- La eldonejo Corvina en Budapeŝto aperigis en 1970 La sep reĝidoj de Béla Balázs. La grandformata libro enhavas kolorajn ilustraĵojn de Adam Würtz.

e. Kolektivo de kvar hungaraj esperantistoj tradukis Dudek horoj: Kroniko de la nuntempa hungara verkisto Ferenc Sánta. Ankaŭ tiu ĉi verko, aperinta en 1966 en Budapeŝto, estas publikigaĵo de la granda libroeldonejo Corvina.

f. 33 Rakontoj: la Esperanta novelarto (1964), redaktita de Reto Rossetti kaj Ferenc Szilágy, estas la 22a volumo en la Belliteratura Serio de la eldonejo Stafeto.

g. Aperis en Stokholmo en 1942 la omaĝa libro 50 jaroj kun Paul Nylén, verkita de Jan Strönn.

ĝ. Esperanto 60-jara estas skizo pri la evoluo de la lingvo literatura kun du specimenaj tekstoj: "Neĝa blovado" de Puŝkin kaj "Cezaro" de M. Jeluŝiĉ. G.J. Degenkamp verkis la libron, kiu estis eldonita en 1947.

h. La Brazilia Spiritisma Federacio en Rio-de-Janeiro publikigis en 1951 Antaŭdumiljaroj de F.C. Xavier en la traduko de L.C. Porto Carreiro Neto.

Sumo: $1+2+3+5+7+20+33+50+60+2000 = 2181$.

DEMANDO 35

(la respondo aperos en nia junia aŭ julia/aŭgusta numero)

La sekcio en *Esperanto en perspektivo* pritraktanta la organizadon de blinduloj en la Esperanto-movado (p. 514-515) komenciĝas jene:

"Blindaj esperantistoj ne estas, nek volas esti, aparta kategorio de praktikantoj de Internacia Lingvo; pro sia blindeco ili nur devas havigi al si lernilojn, komunikilojn kaj literaturajn trezorojn per metodoj sendidaj." La ĉi-monata demando temas pri kelkaj aspektoj de la agado de nevidantaj esperantistoj. Troviĝas ankaŭ du demandoj pri nevidantaj rolantoj en beletraĵoj.

a. Kiu estis la franca instruistino pri prononcado, kiu dediĉis sian vivon al la plibonigo de la stato de surdmuloj, balbutuloj kaj blinduloj? Esperantistiĝante en 1895, ŝi samjare instruis Esperanton al la unua blinda esperantistino, la svisino Hélène Giroud.

b. La plej elstara pioniro sur tiu ĉi tereno estis surda kaj blinda svedo, kiu lernis Esperanton en 1900 kaj okupiĝis pri la disvastigo de la Internacia Lingvo inter siaj samsortanoj. Laŭ profesio li estis presisto de brajlaj libroj.

c. La unua instruisto de Esperanto-kurso por blinduloj estis franca pro-

Eskapu al pli malferma turismo


Kiam vi ferias, vi ne volas loĝi en valizo. Hoteloj kaj planitaj bus-ekskursoj povas ne plaĉi. Por ekkoni landon necesas eskapi la mondon de kelneroj kaj turistgvidantoj. Jen pli kontentiga formo de turismo: PASPORTA SERVO de TEJO. Ĝi estas gastiga servo por Esperanto-parolantoj. Ĵus aperis la listo de gastigantoj por 1980 (kun pli ol 360 adresoj en 48 landoj), kie aliĝintoj povas senpage tranokti. Tiel oni renkontas eksterlandanojn en iliaj propraj hejmoj. Adreso por aliĝoj: J.M. Cash, 9 rue Languedoc, F-78690 Les Essarts-le-Roi, Francio. Aliĝo kostas 15 FF, kio pageblas al la ĝirkonto: Paris — 25 426 58 P — J.M. Cash. La adresaro aĉeteblas ankaŭ ĉe la Libro-servo de UEA: 7,50 (por Nederl. 7,80) gld. PASPORTA SERVO — JE VIA SERVO!



FREMURA

fesoro pri lingvoj, kiu plenumis plurajn gravajn funkciojn en la frua historio de la Esperanto-movado. Konata kiel "Blankbarbulo", li interesiĝis speciale pri la uzo de Esperanto por blinduloj. Kiel li nomiĝas, kie li instruis sian kurson, kaj kio estis la plej grava rezulto?

ĉ. Kiel nomiĝas la unua periodaĵo presita per punktskribo? Kiu fondis, redaktis kaj presis ĝin?



d. Kiu eminenta franca okulkuracisto kaj politikisto, esperantisto ekde 1903 kaj persona amiko de d-ro Zamenhof, fariĝis blinda en sia

62a jaro? Kiel nomiĝas la libro, kiun li verkis pri sia sperto?

e. En 1908 estis eldonita en Helsinki unuakta lirika dramo tradukita el la dana lingvo. Ĝi temas pri blinda princino, kiu reakiris la vidpovon pro sia amo por la kavaliro Tristano kaj per magiaj artifiko de la maŭra kuracisto Ebn Jahia. Kiel nomiĝas la peco, kiu verkis ĝin, kiu esperantigis ĝin?

f. Kiam kaj kie okazis la unua kongreso por blindaj esperantistoj?

g. Kiu romano, originale verkita en Esperanto de nederlanda aŭtoro, pri skribas pacifikan insulon loĝatan de blinduloj kaj komparas la tiean sociordon kun nia civilizo?

ĝ. Kiel nomiĝas la internacia organizaĵo de esperantistoj-blinduloj, kaj kiam ĝi estis fondita?

h. En 1977 aperis en Kiev la dua eldono de biografio en la ukraina lingvo pri blinda esperantisto, kiu akiris famon kiel verkisto de originalaj beletraĵoj. Kiel li nomiĝas kaj kiu verkis lian biografion?

Kiu vegetaran(in)o en Stokholmo pretas gastigi min dum la kongresa semajno 2-9 aŭg.? (event. kontraŭ rekompenco). Volonte ankaŭ prelegos pri "Vegetarismo kaj pozitiva pensado", ankaŭ pri Egiptujo kun kolorbildo. D-ro Tadros Megalli (el Egiptujo), D-8381 Rossbach, FR Germanio.

Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj, celante egaligi sian membro-nombron, ofertas unujaran senkontizitan anecon al virinoj ekaliĝontaj en junio. I.R.P.K.: P.A. de Graaff, "De Lork", Kettingbrugweg 1-3, 7552 CW Hengelo, Nederlando.

Mi volas aĉeti lernolibrojn de aliaj helplingvoj kaj revuojn de movadoj pri aliaj helplingvoj. Ada Ricchiuto, Via Duca di Genova 58, I-74100 Taranto, Italio.

Atentu! Nia klubo bezonas novan ekspozicimaterialon montrantan la utiligon de Esperanto en la lernejo, sindikato, scienco kaj turismo. Ni anticipe dankas! Luise Karlsson, Telegrafgatan 5, S-149 00 Nynäshamn, Svedio.

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio aŭ Greklando, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti cirkuleron kun utilaj informoj: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

La modernigita ortografio (sen ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ; kun q, w, x, y) ebligas akceli la ĝeneralan tutmondan agnoskon, instruadon kaj uzadon de nia lingvo. Informas: O.E.O., 24 avenue Riedisheim, F-68100 Mulhouse.

Ŝparu monon. Mendu viajn anglalingvajn librojn rekte de Anglujo. Skribu al: Language Services, 17 High Street, St. Peter's, Broadstairs.

Senpagan ekzempleron de turisma revuo *La Migranto* petu de Erna Döring, poŝtfako 225, CH-4003 Basel, Svislando.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn: s-ro Mehmet Telyakar, Aydınlık sok. n-ro 23, Ortaköy-İstanbul, Turkio.

Naturistoj/Nudistoj, aliĝu al INOE, legu nian gazeton, renkontiĝu kun ni! Pli ol 200 samcelanoj atendas vin! Inf. kaj aliĝilon petu de: H. Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,80 gld. (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondas nur la anoncantoj mem, kiuj bonvolu noti, ke ni ne donas ripettrabaton por anoncetoj.

20-jarulo deziras tutmonde korespondi kun gejunuloj, pri landoj, sporto, lokomotivoj, aeroplanoj kaj aliaj temoj. Volonte interŝanĝas poŝtmarkojn kaj bildkartojn. Ralph Sterl, Agnesstr. 37, D-8400 Regensburg, FR Germanio.

Helpu varbi! Okaze de regiona kulturfesto ni planas ekspozicion de infandeseĝnaĵoj. Temo "Tiel mi vivas" (hejmo, naturo, libertempo ktp). Limaĝo 14 jaroj. Dorsflanke nomo, adreso, aĝo, sekso. Ĉiu infano ricevos respondon. Multaj bonaj premioj. Bonvolu sendi ĝis 31.7.80 al: Helga Lindner, Lerchenstr. 40, D-4900 Herford, FR Germanio.

Dankon pro la poŝtmarkoj, kiujn vi regule sendas al la Centra Oficejo por finance helpi al UEA. Viaj novaj sendaĵoj de uzitaj poŝtmarkoj estas tre bonvenaj, ĉiam al la adreso de UEA. Tamen, se vi estas regula sendanto, skribu foje al nia komisiito, kiu povus doni al vi gravajn konsilojn. Adreso: Fred de Geus, Radijsstraat 43A, 9741 BK Groningen, Nederlando.

Olimpikaj ludoj okazos en Moskvo (19a de julio – 3a de aŭgusto). Tie daŭre mi ŝatus renkonti geesperantistojn. S-ro Hoine, 4/185 Le Parc de Petit-Bourg, F-91000 Evry, Francio.

Kunvojaĝont(in)on por traeŭropa "vagado" – aŭtostope aŭ trajne – alvokas amikema 22-jarulo: Sašo Gorĝević, Stiv Naumov 5, YU-97000 Bitola, Jugoslavio.

28-jara inĝeniero deziras korespondi kun samaĝaj amikoj alilandaj. Aleksandr Belov, str. Švedskaja 24-4, SU-314029 Poltava, Soveta Unio.

Berlinaj kursanoj (gerentuloj) ĝojus ricevi salutkartojn por ekspozicio en la 58a Germana Esperanto-Kongreso, 21a majo – junio. Danko per bela bk. Adreso: Esperanto-rondo, Herbartstr. 25, D-1000 Berlino 19 (Charlottenburg).

1-a - 21a de julio 1980
en GRESILLON

PRELEGOJ DEBATOJ

jam anoncitaj:

TRILOGIA KULTURHISTORIO
de Sro Rollinger

SEMINARIO pri INSTRUADO
per REKTMETODO
de Sino Childs Mee

por informoj kaj aliĝoj, skribu al
FRANCA ESPERANTISTA
KULTURDOMO

Kastelo Gresillon
49150 BAUGE



DE ANIMO AL ANIMO

DE HUBERTO ROHDEN

En ĉi tiu libro vi trovos vian propran Mion. . .
La aŭtoro estas nur interpretisto kaj elparolanto
de via subkonscienco. . . Estu ĝi via kamarado
kaj amiko ĉe la vivovojo. . . Ĉe la malfacila grim-
pado sur la montoj de Dio. . .

Petu ekzempleron kontraŭ 5 irpk. al: Spirita El-
dona Societo F.V. LORENZ, Caixa Postal 3133,
BR-20000 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

Nova periodaĵo por ĉiu serioza esperantisto:

Ekonomia Bulteno pri Usono

prezentas INFORMOJN, ANALIZOJN, KLARI-
GOJN pri granda kaj grava lando.

Jarabono: US\$ 8.— (12 numeroj); provekzemplero
kontraŭ 1 irpk. Adreso: 7008 Millwood Road,
Bethesda, Maryland 20034, Usono. Abonebla
ankaŭ ĉe la Libroservo de UEA: 18,00 gld. jare.

Savu nin

per starigo de la
SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!

♦ Esp/19

LA ĴURNALISTO Alfonso Sterpellone diris iun ta-
gon en radiodissendo, ke oni ne povas taksu kiel kri-
man la politikan aktivecon. Sed ĉu oni ne povas? Ĉu
ne decas? Ĉu ne konvenas? Oni ne nur povas, sed
absolute devas. Rekoni la ĝisnunan politikon kiel kri-
man estas la unua paŝo, kaj la esenca, por interrom-
pi la aktualan kuron de la Homaro al memekstermo.
Nur la Superdemokrata pensmaniero korektos en la
cerboj tiun frenezan aktualan vidpunkton de Makiave-
li, nepre pereigan. La nuna problemo estas: kiel al la
saĝo venkigi la kuron kontraŭ la nun reganta malsaĝo?
La solvo estas: Mono; multe da mono al la M/I.


♦ Esp/20

LA PATRUJO VERA estas tiu de la hirundoj. Ĝi
ne havas landlimojn, sed disnebulas laŭ la distanco
de la kerna centro de la medio, en kiu la individuo
naskiĝis kaj kreskis. Tio estas ĝia propra nesto,
varianta de birdo al birdo. LA PATRUJO FALSA
estis inventita de la politikaj tronrabistoj, por
gardi sian propran konsistantan el la politika bes-
taro. Ties kaĝoj estas la unuopaj landlimoj. Iuj pri-

mitivaj reĝoj servis vere al la propra subularo, defen-
dante ilin. Sed, iom post iom, tiu defenda rolo ŝan-
ĝiĝis al ekspluatado de ili por la propra poŝo kaj fa-
vore al la propra klano, sed sub la masko de la kapa-
bla kaj bonkora servo al la propra politika bestaro.

♦ Esp/21

DEMOKRATIO signifas rezervi la decidojn politi-
kajn ekskluzive al laikeco politika de la amaso da
cerboj ne preparitaj por tiu tasko. Tial, tiuj personoj
malutilas al si mem sinsekve, kiel pruvis milfoje la
praktikaj konsekvencoj. Demokratio signifas kondu-
ti precize male ol postulus konduto saĝa. Sed tio
estas kaprico infanmensa kaj multekosta, kaj eĉ kri-
ma. Krima, jes, ĉar ĝi trudas al la malmultaj perso-
noj, kiuj kondutas saĝe (kaj estas for de la amaso),
iri la saman eraran vojon trudatan al ili de la plimulto,
sen poste esti rekompencataj de la venkintoj pro la
malavantaĝoj perforte suferigitaj al ili. Kaj tiu konduto
estas almenaŭ teorie esence krima, kaj cetere stulta.



MONDHARMONIIGA INSTITUTO
VIA SPORT 18, I-40065 PIANORO, ITALIO

Kompletas nun la raciaj solvopropoj de la serio

internacia diskutejo.

Nun vi kapablos konsili al viaj respondeculoj pri

- | | |
|----------------------|---------|
| 1 monda monsistemo | öS 45,— |
| 2 internacia aboco | 54,— |
| 3 inflacio | 54,— |
| 4 monda ekonomi-ordo | 54,— |
| 5 nacia monsistemo | 54,— |
| 6 senlaboreco | 54,— |
| 7 sennacia ŝtato | 60,— |

Pagu al poŝtĉekkonto 7503.218 Vieno, d-ro Hartl
aŭ mendu ĉe UEA. LEGU, DISKUTU, POSTULU!

Ĉu vi ŝatus gajni monon?

Kompreneble, kiu ne ŝatus havi kroman en-
spezon por finfine povi aĉeti kion oni jam
delonge deziras aŭ por pagi kongreskotizon,
libron aŭ similan?

Ekde nun la Grafika Centro de UEA **donacas
maklerajon de 7,5 %** por ĉiuj kompost- kaj
preslaboroj* kiujn ĝi plenumas dank'al via
perado. Konkreta ekzemplo: sekve de via
perado iu mendas ĉe ni faldfoliojn kun entuta
kosto de 1000 guldenoj. Vi ricevos 75 guldenojn
de ni, donace!

Por pliaj informoj aŭ perado de mendoj, turnu vin
rekte al la Grafika Centro de UEA, Arsenaal-
straat 5, B-2000 Antwerpen (☎ + 3231 160505)

*Minimuma fakturprezo 100 gld.

TUT-AMERIKA ESPERANTO- KONGRESO

12a — 15a de julio 1980

San Luis, Argentino

Koran inviton al amerikanoj kaj neamerikanoj por par-
topreni la Kongreson. Ni petas, ke la esperantistoj de la
tuta mondo amase sendu salutojn al la sekva adreso:
Tut-Amerika Esperanto-Kongreso, Chacabuco 405,
RA-7500 San Luis, Argentino. FARU TUJ! DANKON!

INVITO

LA 2a PACIFIKA KONGRESO

HONORA PATRONO — PROF. RALPH HARRY

La Kongreso okazos de la 26a ĝis la 29a de julio 1980 en
Universitato de Brita Kolumbio, Vankuvero, Kanado.
Samtempe (kaj samloke) estos ankaŭ la kongresoj de la
landaj asocioj de Kanado (KEA) kaj Usono (ELNA).
Antaŭkongresa kaj postkongresaj ekskursoj estas aranĝi-
taj. La plej populara el ili estas la Postkongresa Ekskurso
n-ro 2, dum 6 tagoj (30a de julio — 4a de aŭgusto), kiu
kondukos tra la bela Brita Kolumbio (Kamloops, Rocky
Mountain ŝtatparkoj Banff, Jasper, Yoho kun 12 972
futojn alta monto Robson, Lago Okanagan). Vojaĝo per



hotelmobilo — aŭtobuso, kiu per speciala aranĝo fariĝas
nokta tendo. Kostoj: Kan.\$ 245 por persono, inkluzive
ĉiujn manĝaĵojn kaj dormosakojn.

Por aliĝilo skribu al: Dua Pacifika Kongreso de Esperanto,
373 Guilby Street, Coquitlam, B.C., Kanado, V3K 3Y5.

ĈU VI JAM MALKOVRIS ĈI TIUN UNIKAN PERIODAĴON EN LA INTERNACIA LINGVO?

MONATO

Eldonanto: Torben Kehiet / STAFETO
Ĉefredaktoro: Stefan MAUL

40 paĝoj DIN A4 — riĉe ilustrita
11 kajeroj jare

Jara abono: 49,50 gmk aŭ 880,- b.fr.

La abonon bonvolu sendi rekte al la eldon-
ejo: TK/STAFETO, Heideweg 20, B-2120
Schoten. Belgio. Poŝtĉekkonto je la nomo
de la eldonejo estas: 000-0422856-33.

Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de "MONATO",
petu provekzempleron kontraŭ du internaciaj res-
pondkuponoj. (Vi tamen memoru, ke unu persono
povas nur unufoje fari tian peton). Antaŭdankon!